

3^o JARO.

OKTAVIO.

N^o 4

TRA LA MONDO.

• TUTMONDA • ILUSTRATA • REVUO • ESPERANTISTA •

OCTOBRO
1907.

ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

NUNTEMPAĴOJ : Monata kroniko, de *E. Montrosier* (FRANCUJO).

TEATRO : Kaprico, de *Alfred de Musset*, tradukita de *Johanino Flourens*.

ĈIULANDA LITERATURO : La mireginda tekruĉo, JAPANA fabelo⁴ laŭ la angla traduko esperantigita de *D^{ro} Gambier* (FRANCUJO).

TRA LA MONDO : Napolo, de Grafo *A. Gallois* (ITALUJO).

VIRINA PAĜO : La Modo, de *Roksano*.

SPORTOJ : Kroniko, de *L. de Guesnet* (FRANCUJO).

KOMERCO KAJ INDUSTRIO : La Rochelle, de *Sam Meyer*.

INFANA PAĜO : Fizikaj amuzaĵoj de *Amatus* (FLANDRO).

PRI ESPERANTO : La Kembra kongreso (Fino), de *A. Montrosier*, *Th. Rousseau*, *Steleto*.

Bibliografio, Kroniko.

MUZIKO : L'Espero, muziko de *S^{ro} A. J. Witteryck* (BELGUJO).

Jara abono: 8 fr. (3,20 Sm.) ĉiulande — Duona: 4.50 fr. (1,80 Sm.).
La abonoj komencas en Januaro, Aprilo, Julio, Oktobro.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landojne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva valoro.

Internaciaj **RESPOND-KUPONOJ** estas akceptataj kiel 25 cent (10 Sd.).

« Tra la Mondo » aperas **REGULE KAJ AKURATE** monatfine krom en Aŭgusto.

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Ĉiuj korespondaĵoj, mendoj, k. a. devas esti senditaj nur al nia administracio por eviti erarojn aŭ prokrastojn. Oni ankaŭ abonnu aŭ reabonu senpere por la sama motivo.

Adreso: **Gazeto « Tra la Mondo »**, Meudon (S. et O), France.

Urgaj sciigoj; REKLAMOJ, ANONCOJ, k. a. devas alveni antaŭ la 10^a de ĉiu monato, por la tuj elironta N^o

ASP KANDELLANTERNOJ

por Biciklistoj

Malgranda, Malpeza,
Oportuna, Pura,
Neestingebla
en Ventego,
Funkciadas bonege
nur kiam oni uzas
la por ĝi



Konstruitajn ASP-Kandelojn

145.000 Lanternoj jam venditaj!

Kostas: 4 danajn kronojn, = Spes. 2,20

kun lenso 5 kronojn, = » 2,75

18 Kandeloj kostas 1 1/2 kronojn = » 0,83

SENDOTA ĈIEN DE


O. F. ASP, Kopenhague.
DANUJO.

ANGLUJO

Propraj Kondiĉoj.

Generala Agento:

S^{ro} G. RUTTER, 30, Red
Lion Squar, LONDON.



L'Internacia Signo

estas la « VERDA STELO » Gasse

MARKO REGISTRITA

fr. 1 por unu; fr. 9 por 12; fr. 45 por 100 (per
kunmona mendo). Ĉe S^{ro} Emilo Gasse, 105
rue du Lycée, Le Havre (France).

TARIFO DE NIA PUBLIKIGADO.

Prezo je la linio	}	ANONCOJ:	{	Por unu anonco:	0 fr. 75 ĉiulinie.
		(33 literoj)	}	Por 3 anoncoj almenaŭ	0 fr. 60 —
		REKLAMOJ (50 literoj):	}	Por la tuta jaro	0 fr. 50 —
				2 fr. 50 ĉiulinie.	

Prezo je la paĝo (1 paĝo = 432 cm. kv.)

	1 paĝo	1/2	1/4	1/8	1/16
Por unu anonco:	100 fr.	58 fr.	32 fr.	18 fr.	10 fr.
Por 3 anoncoj almenaŭ:	80 fr.	46 fr.	26 fr.	15 fr.	8 fr.
Por la tuta jaro:	50 fr.	30 fr.	16 fr.	9 fr.	5 fr.

Sendi la tekstojn kun la menda kosto al « Tra la Mondo », Meudon (S. & O.)
France, antaŭ la 10^a de ĉiu monato por la numero eliranta je la fino de l' monato.

NE KOMERCAJ ANONCETOJ.

1,25 fr. por 4 linioj enhavantaj ĉiu 33 literojn minimume. Ĉiu plua linio
komencita kostas 0 fr. 25.

Pro la dislegado de « TRA LA MONDO » EN LA TUTA MONDO, tiuj anoncoj mal-
karaĵ estas tre rekomendataj al la multaj filatelistoj kaj poŝtkartaj kolektistoj:
pli generale al ĉiuj kolektistoj kaj al ĉiuj dezirantaj uzi Esperanton por havi ĝi
rilatulojn en fremdaj landoj, aŭ por dokumenti: ni rekomendas ankaŭ tiujn
anoncetojn al la grupestroj dezirantaj interrilati kun fremdaj samideanaj
grupoj, kaj al la Esperantaj profesoroj, kies studentoj deziras trovi fremdajn
korespondantojn por perfektigi en la lingvo per la internacia interkorespondado.

POR ESPERANTO ★ POR ESPERANTISTOJ

Vera

Vino Campanja

PETU

LA

ORA MARKO.

Originala Produktejo de
FORTIN PÈRE & FILS en EPERNAY (France).

SENPAGAN TARIFON

La bela duobla poŝtkarto montranta
la revuojn esperantajn, kiuj eliris je la 20-jara
jubileo de Esperanto kostas: 10 ekz., 35 Sd. —
25 ekz. 77 Sd. — 100 ekz. 2,5 Sm. — 1000 ekz.
18,7 Sm. Ĉe *Casopis Ceskych Esperantistu*. Praha-II
Bohemujo.

Respondoj.

S^{ro} Soler Valls (*Hispanujo*). — Turnu vin al la
mondkonata firmo **Debernny**, kiu havas provizon de
supersignitaj literoj kaj kontentigos vin.

S^{ro} Snape (*Anglujo*). Sinceran dankon pro via
interesa manuskripto.

S^{ro} E. S. Hunter (*Brazilujo*). Koran dankon pro
via interesa vidaĵo de la Helpa Domo.

S^{ro} H. Luyken (*Anglujo*). La afero, pri kiu vi
skribas al mi estas tro speciala por « Tra la
mondo », sed intesus sendube « Espero Katolika ».

Ni respondas TIE ĈI al la leteroj akompanataj
de internacia responda kupono: PRIVATE al
la leteroj akomp. de du internaciaj kuponoj.

Hispana eldona Societo

Deziras riprezentantojn.

Sin turni al S^{ro} Rafael Duyos, administranto,
Buénavista, 21, Valencia, Hispanujo.

ANONCAGENTO. C. A. G. BROWNE, 53 kaj 54,
Wych Street, Strand, W. C.
London, Anglujo, deziras korespondi pri anoncoj
kaj reklamoj. Varbas anoncojn por « Tra la Mondo ».

FERVOJOJ DE PARIS-LYON-MÉDITERRANÉE.

LA VINTRO ĈE LA LAZURA MARBORDO.

Opaj ir- kaj reiraj biletoj, 2^a kaj 3^a klasaj.
Uzeblaj ĝis la 15^a de Majo 1908.

De la 1^a de oktobro ĝis la 15^a de novembro 1907, la stacidomoj
P. L. M. liveras, al la familioj de almenaŭ tri personoj kune
vojaĝantaj, ir- kaj reirajn biletojn opajn 2^a kaj 3^a klasaj al
TOULON kaj ĉiuj stacidomoj P. L. M. sidantaj transe, al
MENTON. La simpla iro devas ampleksi almenaŭ 400 km. (La
ira kupono de tiuj biletoj estas uzebla nur ĝis la 15^a de nov.)

La koston oni kalkulas aldonante al la kosto de 4 ordinaj
simplaj biletoj (pro la 2 unuaj personoj), la prezon de simpla
bileto pro la 3^a persono, la duonon de tiu prezo pro la 4^a kaj
ĉiu el la sekvantaj.

LAŬVOLAJ HALTOJ.

Peti la bileton almenaŭ 4 tagojn antaŭe al la deira stacidomo.

Rapidaj kaj luksaj vagonaroj, el belegaj kaj komfortaj veturiloj
sur bogioj por la marbordaj stacioj. Paris-Nice (1087 kil.) en 13,45 h.
per la Côte d'Azur — Rapide.

Napolo.

La urbo.

Kiu alvenas de alta maro per vaporŝipo estas mirigata, kiam li ekvidas la panoramvidaĵon de Napolo!

Efektive, la antikva Partenopo de la Grekoj kuŝas amfiteatre sur la flankoj de vastega monteto, ĉe la malantaŭo de l' golfo de Napolo. Oriente, altiĝas la majesta Vezuvio, kun sia kratero senĉese fumanta; Polizipa promontoro fermas la golfeton okcidente. La vidaĵo de l' urbo estas tute ensorĉa kaj admirinda!

Kian belegan spektaklon prezentas efektive la rava golfeto, kiam oni rigardadas ĝin el la plej altaj lokoj de l' urbo: dekstre, verda monteto sur kiu multaj « villa » kaj kamparomoj estas dissemiĝintaj, kaj ĉarme rebriliĝas en lazura kaj klarega akvo; maldekstre, troviĝas vilaĝetoj « Portico », « Resin », « Torre del Greco », « Torre Annunziata », kiuj kuŝas ĉirkaŭ la terura vulkano, kies mortigaj elsputoj ĉiam minacas, ilin detruiri. Poste, oni vidas « Castellamare », (antikva « Stabio »), kaj la beletan vilaĝeton « Sorrento », kie « Tasso » naskiĝis, fine la pinton « Campanella ». Kontraŭe en tre pentrinda sideo, insulo « Capri » finas tiun belan panoramon.

La urbo montras nek regulajn nek simetriajn konstruejojn, kaj ne havas belajn placojn aŭ stratojn; la ĉefaj monumentoj estas la Reĝa palaco, la teatro Sankta Karlo, la Muzeo, kelkaj preĝejoj, kiuj enhavas historiajn memoraĵojn, kaj multaj bonfarantaj fondoj. Tamen, pro la dolĉeco de l' klimato, la diverseco de la amuzadoj, la vivo, la movo kaj la gajeco de la loĝantoj, Napolo estas tute agrabla loĝado.

Napolaj Stratscenoj.

En Napolo, oni povas observi multajn stratscenojn kuriozajn kaj interesajn. Efektive, vidu tiujn bubojn (Lazzaroni), sidantajn tere ĉe la angulo de la strato; meze de ili estas plado plena je makaronioj; ili ekprenas plenmanon, altigas super la kapo tiujn longajn pastojn, kaj, iom post iom, ilin manĝas kun granda plezuro; dum tiu ĉi neceremonia manĝado, ili ridegas kaj sprite ŝercas la belajn junulinojn, kiuj ĝoje respondas sammaniere; ĉiuj ridas, kaj tiam, por fini la manĝadon, la buboj trinkas puran akvon je la tervazoj, kiujn portas la junulinoj.

Napolon vidi, kaj morti!

Nun, rigardu tiujn gefiŝvendistojn: la viroj, nudpiede, kun mallongaj pantolonoj, kaj havantaj la kapon vestitan per Napola ruĝa kufo; la virinoj, same nudpiede, kun jupo je helaj koloroj, blanka ĉemizo je larĝaj manikoj, kiuj permesas vidi belajn kaj rondformajn brakojn, delikatan kolon, brunigitan de suno kaj de mara venteto; la kapo nekovrita montras sufiĉegan nigran hararon, kies frizigemaj bukloj, levetataj de la vento, faras malpezan aureolon ĉirkaŭ la ĉarma kaj juna vizaĝo de tiuj fiŝvendistinoj; ili portas korbojn plenajn je freŝaj fiŝoj, kaj trairas ĉiujn stratojn de l' urbo, kriante, per Napola modulado, por anonci sian komercaĵon.



KIOM DOLĈA NENION FARI!

Plej malproksime, ĉe l' strato Coracciolo, sur la marbordo, oni povas observi multe da fiŝkaptistoj, kiuj kune tiras longan ŝnuron. Tiu ĉi ŝnuro estas alligita je grandega reto, kiun aliaj fiŝkaptistoj lokis, matene, tre malproksime en la maron; post du aŭ tri horoj, la reto, rekondukita teren, enhavas multegon dasardeloj je la brilajskvamoj, kiuj saltas sur la sablo.

Aliaj kuriozaj stratscenoj estas la aeraj oficejoj de publikaj skribistoj, kiujn oni renkontas ĉe la anguloj de kelkaj stratoj: sidante malnovan kaj malaltan seĝon, la maljuna skribisto plenumas sian profesion trankvile kaj konsciencie; protektata

kontraŭ la sunradioj per grandega ombrelo, li skribas, sur mallarĝa tablo, petskribojn aŭ protestskribojn, anonimajn leterojn aŭ amajn leteretojn, komercajn sciigojn aŭ sensignifajn aferojn; ĉiam indiferenta kaj sensenta, li skribas por ĉiuj, poste, memvole, li forgesas ĉion, kion li skribis. Li ne riĉigas sin per tiu metio, sed li estas tre simpla, kaj malgrande vivas: iom da pano aŭ da « polento », iom da makaronioj, unu aŭ du bulboj kun salo, kaj sufiĉega plengorĝo da freŝa akvo, jen estas la modesta manĝado de la Napola publika skribisto, kiel, aliparte, de ĉiuj Napolanoj.

Grafo ALBERT GALLOIS.

Italujo.



La laboraj kunsidoj.

La programo enhavis kelkajn ĝeneralajn kunsidojn, kaj multajn por specialistoj: lingva komitato, militistoj, ruĝkruculoj, maristoj, ĵurnalistoj, « Vagabondoj », pacifistoj, ruguloj, muzikistoj, katolikoj, kontraŭalkoholistoj, liberpensuloj, blindulaj amikoj, instruistoj, k. a.

Kompreneble, estis tute neeble ĉeesti al ĉiuj, kaj tio estas bedaŭrinda ĉar, en kelkaj, okazis tre interesaj diskutoj, sekvitaj de praktikaj konkludoj. Ni citu la kunvenon pri la traduko de la Sankta Biblio, kun 200 ĉeestantoj sub la prezido de nia klera kaj afabla kunlaboranto Pastro J. C. Rust, la kunvenojn de Internacia Scienca Asocio, tiun de la maristoj, kiuj akceptigis deziresprimon pri fondo de Marista Ligo; tiun de la militistoj, kiuj decidis la starigon de plena raporto pri la nuna oficiala situacio de Esperanto en la diversnaciaj armeoj; tiun de la komercistoj, kie estis prezentata, de Sr^o Lecaron, prez. de la komerca Sekcio de la Pariza grupo, interesa raporto pri la organizo de internacia korespondado. De nun, dank' al la laboro de la Sekcio, la komercistoj povas trovi en la tuta Francujo korespondantojn kaj tradukistojn, kies nomoj laŭ departementoj estas riceveblaj, kun specialaj tradukigiloj, de la Sekcio (Esperanto, 21, Rue de l'Arbre Sec, Paris). Oni konigu tiun interesan organizon. Estas decidita ankaŭ la fondo de internaciaj societoj por la virinprotektado, kaj por la protektado de la bestoj.

Verdire la specialistaj kunvenoj estis la plej interesaj, kvankam iuj ne havis sufiĉan preparadon.

Pri la ĝeneralaj kunvenoj, laŭ la opinio de la plimulto ili estis malpli interesaj ol dum la antaŭaj kongresoj, pro manko de programo. Kontraŭe je tio, kio ofte okazas, anstataŭ mezuri la tempon al la parolantoj, oni preskaŭ petegis personojn, por ke ili bonvolu paroli. Kaj, ĉar preskaŭ ĉiu kongresano estas propagandisto, oni aŭdis personojn rakontantajn tion, kion ili faris por la propagando... t. e. agojn similajn al multaj agoj faritaj de multego da aliaj personoj; kaj kelkaj el ili estis terure parolemaj. Iafaje, tamen, oni aŭdis interesajn rezultatojn, atentindajn proponojn, ŝatindajn sciigojn: Sr^o Grillon, el U. S. de A. estas fondanta en Seattle lernejon por la instruo de la fremdaj lingvoj per Esperanto, kaj li esperas pruvi, ke la lernado de iu ajn lingvo post tiu de Esperanto ne estos pli longa, ol la lernado de la fremda lingvo sola; li rimarkigis ankaŭ, ke de unu jaro, la nombro de la amerikaj esperantistaj societoj kreskis de 3-4 ĝis 65; Sr^o Frenkel, el Siberujo, tute prave rimarkigis, ke, por la enkonduko de Esperanto en la instruajn programojn, oni devas konvinki la gepatrojn kaj instigi ilin, ĝin postuli laŭ la specialaj rimedoj uzeblaj laŭ la landoj; interesaj raportoj pri Esperanto en la franca armeo, kaj Esperanto kaj Ruĝa-Kruco, verkitaj de nia fervora kunlaboranto Leŭtenanto Bayol, estis legataj respektive de K^{no} Capé kaj de nia bonega kunlaboranto D^o Artigues; Sr^o Deshayes el Sens (Franco), atentigis pri la klopodaj farotaj por enkonduki Esperanton en la internaciajn kongresojn, kaj ankaŭ en la socialajn, kunhelpajn societojn...; Sr^o Harvey, la distinginda redaktoro de « The American Esperanto Journal » parolis pri la grava agado de la ĉefa revuo « North American Review », kiu ne sole helpas nian aferon per sia morala apogo, sed intencas ĝin helpi monie. Li proponis fari la proksiman kongreson en U. S. de A., sed nia amiko D^o Mybs, prez. de la « Germana esperantista Societo » invitis la esperantistaron al la « Kvara » en Germanujo. La invito estis danke akceptata. Eble okazos, estonte, du kongresoj: unu por la Malnova, unu por la Nova Mondo. Tiu propono, farita de kelkaj personoj, estas tre atentinda, kaj certe multe efikus por la propagando, pro la samaj kaŭzoj, kiujn ni eldiris, kiam ni subtenis la proponojn de Sroj Otto Simon kaj Tabenski pri la ĉiujara festo de la esperantismo: la naciaj gazetoj pli atentigas pri tio, kion ili povas kontroli.

Laŭ propono de Sroj Sydney Whitaker kaj C. Aymonnier, oni intencas krei esperantistan restjeon apud la ĉiujara kongresa urbo, por ebligti kvietan ripozon, meze de samideanoj, post la kongresaj laciĝoj.

La diskutoj estis tre lerte kondukataj de nia juna sed sperta samideano H. Bolingbroke Mudie, kiun la prezidanto de la kongreso, kolonelo Pollen komisiis por tiu delikata rolo.

Granda silento regis dum la paroladoj, ĉar la personoj, kiuj deziris eniri aŭ eliri dum la kunsidoj, povis ĝin fari nur iamente, kiam oni malfermis la pordon.

Pri la laboraj kunsidoj, ni ricevis interesajn rimarkojn de du tre favore konataj esperantistoj: Sroj Th. Rousseau, nia bonega franca kunlaboranto, kaj Otto Simon (Aŭstrujo), la distinginda instiginto de la ĉiujara esperantista festo.

Jen la opinio de P^{ro} Rousseau: « Pri la laboro efektiva de la

kongreso, ŝajnas ke, depost Ĝenevo, oni faris progresojn kaj ankaŭ... malprogresojn. Progresojn, ĉar oni fine komprenis en la Tria, ke la plej bonaj diskutoj okazas ne en ĝeneralaj kunvenoj sed en specialaj kunvenoj; kaj, efektive, en multe da specialaj kunvenoj oni trafis bonegajn rezultatojn. Sed, en la ĝeneralaj kunvenoj, almenaŭ dum la unuaj tagoj, oni ne bone sciis, kion oni celas. Dum, en Ĝenevo, oni starigis precizan tagordon skribitan videble sur la nigran tabulon, en Kembriĝo la tagordo estis tiel malpreciza, ke ofte oni demandis al si, ĉu ĝi ekzistas.

Aliparte la festoj aranĝitaj posttagmeze malhelpis multon da kongresanoj, ĉeesti la specialajn kunvenojn, tiamaniere ke la laboro en ĉi tiuj kunvenoj estis multe malpli bona, ol ĝi povus esti. Ŝajnas al mi, ke oni povus aranĝi la aferon ĉi tiel:

Estas perdo da tempo, se ĉiu venas sur la parolejon por diri, kiun propagandon li faris, kiujn rezultatojn li trafis, k. t. p... Pli ofte tiuj paroladetoj estas ĉiuj samaj. Sed ŝajnas, ke ĉiu nacia societo propaganda, ĉiuj propagandistoj en specialaj fakoj (armeo, komerco, instruado, ... k. c.) devus sendi antaŭ la kongreso, je fiksita dato, plenan raporton pri la rezultatoj trafitaj depost la lasta kongreso ĝis alia fiksita dato, kiel eble plej proksima de la unua. La ĝenerala sekretario de la kongreso, aŭ alia persono speciale kompetenta, aŭ speciale difinita de la antaŭa kongreso resumas klare tiujn raportojn, insistante speciale, kiam iu nova rimedo por propagandi aŭ iu nova organizaĵo estus elpensita. Ĉiu ĝenerala raporto estus legata de la raportinto aŭ de la sekretario en la 1^a ĝenerala kunveno.

Tiamaniere, kaj ne perdante multe da tempo, oni havus tre klaran ideon pri la progresoj faritaj depost la lasta kongreso, kaj pri la landoj kaj fakoj, al kiuj oni devas precipe turni la propagandon. Tiel, la ĝeneralaj raportoj estus valora fundamento por la kongresaj laboroj.

Tiuj ĉi kaj la festoj devus okazi tute aparte, kaj neniam samtempe, tiamaniere ke oni povus ĉeesti la unujn aŭ la aliajn sen bedaŭroj aŭ sen konscienciproĉoj; oni dediĉus unu ĝeneralan kunvenon por unu aŭ du serioj da specialaj.

En la komenco de ĉiu ĝenerala kunveno estus absolute necese, ke oni konigu tre precize la tagordon. Same, estus necese, ke la specialistoj pripensu dum la jaro pri la diskutindaj aferoj kaj sciigu antaŭe la interesatojn pri la ĉefaj el ili.

Oni devas eviti, starigante la programon de la kunsidoj, ke kelkaj el ili, kiuj certe interesas samajn personojn, okazu samtempe. Ŝajnas ankaŭ absolute necese, ke la estroj de la propagandaj societoj faru specialajn kunvenojn, kiel la redaktoroj de ĵurnaloj, k. e. »

Jen nun la rimarkoj de Sr^o Otto Simon:

« La kongresetoj en la kongreso, kiel oni povas nomi la specialistajn kunsidojn, certe havos grandan signifon en niaj estontaj kongresoj. Ĝis nun ni ne konas ĉiujn decidojn de tiuj kongresetoj, ni nur citu kelkajn el la konataj rezultatoj. La tradukado de la Biblio estas donita al komitato, konsistanta el katoliko, protestanto, hebreo, k. t. p.; la instruistoj kreis tutmondan Ligon por enkonduki Esperanton en la lernejojn; la virinoj kreis Ligon por la protektado de la junaj virinoj; la stenografistoj, la farmaciistoj, la kuracistoj, la oficiroj, la ruĝkruculoj, la pacifistoj, la socialistoj, la junuloj k. t. p. ankaŭ prenis gravajn decidojn; kaj la Lingva Komitato, kiel ankaŭ la Scienca Asocio, kelkfoje kunvenis kaj preparolis en longedaŭraj kunsidoj tre seriozajn temojn. Nu, se oni pripensas, ke tiuj kunsidoj okazis nur kvazaŭ en la restoj de la tempo, ho! ve tre ŝarĝita de la kongresanoj, kaj se oni komparas la fruktojn kun la malriĉaj rezultatoj de aliaj internaciaj kongresoj, oni devas konfesi, ke Esperanto signifas neniam supozitan evolucio de ĉiuj internaciaj kongresoj. »

La ferma kunsido.

Ĝi inde finis la kongreson per kelkaj praktikaj rezultatoj: oni aŭdas raporton pri la esperantistaj konsulejoj, kies nombro atingas jam 203. Oni uzu ilin, kaj la servojn de la sindonemaj konsuloj, kiel eble plej multe.

Prof^o R. de Saussure legas interesan raporton pri la funkciado de la Internacia Scienca Asocio, kaj akceptigas deziron pri la disvastigo kaj uzo inter la esperantistoj de la decimala helpa mono.

Ni multe konsilas la legadon de Internacia Scienca Revuo (n^o 46) kiu enhavas plenan raporton pri la tri kunvenoj en Kembriĝo de I. S. A. La n^o 45 enhavas provizoran protokolon. Ĝia enhavo, kiel tiu de la antaŭaj, estas, cetere, pleje interesa, varia kaj vere internacia.

Post entuziasma parolado de Prof. Mayor, el la Kembriga universitato, maljunulo okdekjara, D^{ro} Zamenhof resumas la signifon de nia tria kongreso, kiu ĝojige atingis sian celon montrante al la mondo grandiozan manifestacion, kiu denove kunfratigis la diversnaciajn esperantistojn, kaj fortigis kaj potencigis la esperantismon (*).

La Blinduloj ĉe Kembrigo.

Tiuj el niaj legantoj, kiuj malavare donacis por la blinduloj, ekscios plezure ke dudek unu, el 8 malsamaj landoj, ĉeestis la kongreson kaj tie ĝuis neforgeseblan ĝojon interkonatigante kun sammalfeliĉuloj, kaj aŭskultante niajn diskutojn, teatrajn prezentadojn, k. t. p. S^{ro} Profesorino Cart, la sindona blind-amiko (tiflofilo) povas esti ĝoja pro la sukceso de sia iniciato.

La Ekspozicio.

En nia lasta artikolo ni diris, ke oni devas kiel eble plej multe konigi la komercistojn, kiuj venas al Esperanto.

Ni do rimarkigas plezure la favoran akcepton faritan en Kembrigo al la *Flor Esperanta*, kreita speciale por la kongresanoj, de la grava firmo L. Gouyou kaj J. Fèvre, el Troyes (France).

Tiu bonega digestiga kaj fortikiga likvoro, prunteprenas nenion al la fabrikadaj procedoj, sed estas la rezulto de la natura distilo de kreskaĵoj, kies bonfarajn kvalitojn pravas la botanika scienco, la eksperimento kaj la analizo.

Fabrikata laŭ la samaj metodoj, la *Chablis Quina* estis ankaŭ unuvoĉe laŭdata kiel aperitivo, ĉar ĉiuj kongresanoj ne estis kontraŭuloj de ĉiu alkoholo!

Multe da ili festis la ĝojon pro la intervidiĝo, havante ĝlason en la mano. Por tio oni uzis la bonegan « *Vera Vinu Campanja* » n, kreitan de la firmo Fortin Patro k. Filo en Epernay, ĉar ni jam havas veran Campanjan vinon. Sola li havis lokon sur la tabloj de la kongresanoj en Kembrigo, kaj la frandemuloj ĝin opiniis tute senegala.

La postkongresaj ekskursoj.

Ili estis tre bone aranĝitaj, kiel la dumkongresaj festoj. Agrablaj vizitoj tra Londono kaj ĝiaj muzeoj, koraj akceptoj en la « Guildhall » kaj Poliglota Klubo, pasigis ĉarmajn horojn en la grandega brita ĉefurbo. Tiuj horoj estis agrable plilongigitaj per kelkaj feliĉuloj, kiuj vizitis aŭ Kimrujon, gvidataj de S^{ro} Bolingbroke Mudie, aŭ Skotlandon, gvidataj de nia kunlaboranto S^o W. Page.

Longe restados en la memoro tiuj ĝojigaj momentoj.

Internacia monpapero.

Dum kunveno de la Esperantista Scienca Asocio oni legis raporton de nia distinginda kunlaboranto, S^{ro} C. Steenbuch, pri la kreo dezirinda de internacia monpapero por la pago de malgrandaj sumoj letere.

Tiu kreo estas nun efektivigita.

Oni scias, ja, ke la poŝta Roma kongreso kreis internaciajn respond-kuponojn aĉeteblajn 30 cent. (12 Sd.) kaj interŝangeblajn, en la landoj interkonsentitaj, kontraŭ 25 cent (10 Sd.).

Ĉiuj Eŭropaj landoj kaj kolonioj **krom Rusujo, Portugalujo, Serbio, Montenegro kaj Malto** akceptas ilin.

En Ameriko nur la jenaj landoj **ilin akceptas: U. S. de A., Brazilujo, Ĉilio, Kosta-Rika, Haitio, Meksikujo.**


En Afriko kaj Azio, la respond-kuponoj estas akceptataj nur en la eŭropaj poŝtoŝticejoj.



Ni akceptos la respond-kuponojn NUR laŭ la valoro je 25 cm. (10 Sd.).

Poŝta Perdo.

La manuskripto de la monata kroniko estas perdita de la poŝto. Pro tio, niaj legantoj ne trovos en tiu ĉi n^o tiun interesan paĝon, kvankam anoncitan sur la kovrilo.



Fot. A. Ploussu.

EN LONDONO.

La samideanaj veturiloj dum vizito en British Museum.

La « **Belga Sonorilo** » komencis, kun la n^o de la 10^a de Aŭgusto (67^a n^o) sian 6^{an} ekzistan jaron, kaj jam aperis 4 novaj numeroj. Tiu n^o 67^a enhavas tre gravan raporton pri agado de la *Belga Ligo Esperantista* fondita antaŭ 2 jaroj, kaj kiu, sub la prezido de K^{to} Lemaire Charles, donas belan ekzemplon de poresperanta laboro, agente kun la partopreno de la plimulto el la belgaj grupoj, helpante tiujn, kiuj ne ankoraŭ tute kunigis kun ĝi.

Ekzemplo montris, kiel praktikeme agas niaj belgaj amikoj: en la programo de l' ekzameno por l' akiro de l' atesto pri profesora kapableco sin trovis letero, skribota de la konkurantoj, kaj kies temo estis: *konigu al unu el viaj kontraŭuloj la rezultatojn, kiujn liveros la ĝenerala ekzameno de helpa lingvo internacia dua kaj sama por ĉiuj.*

Jen jam bonega ideo. Sed la voĉa ekzameno estis ankoraŭ pli atentinda kaj imitinda. Ĉar la celo estis aljuĝi diplomon pro profesora kapableco, la ĉefa parto de tiu ekzameno konsistis el *praktika leciono* pri iu difinita temo (la grado de komparo), farita antaŭ lernantaro.

Per tiaj provoj, la belga ligo estas certa havi profesorojn kapablajn instrui, kaj ankaŭ propagandi.

En la literatura parto de tiu n^o de « **Belga Sonorilo** », interesa artikolo pri Islando de nia bonega kunlaboranto Th. Thorsteinnson. Ni trovis ankaŭ represon de nia artikolo pri « **Esperanto en la mara Armeo** ». Tiu artikolo jam bone efikis, kiel estas dirite ĉi sube:

Ni, ja, ricevis de S^{ro} William Rae, Edinburgh, la jenan leteron: « Kara Sinjoro, dank' al la artikolo kaj fotografaĵo, kiuj antaŭ kelkaj monatoj aperis en via gazeto (kiu mi ĉiam legas kun granda plezuro kaj profito) pri la maristara grupo sur la militŝipo Ibis, mi havas la plezuron sciigi al vi, ke ni, la Edinburgaj gegrupanoj, havis la honoron bonvenigi niajn marsamideanojn, je la okazo de la alveno de la ŝipo al nia marbordo Leith. Kvar el ili ĉeestis nian ĉius-emanjan teotrinkadan kaj babiladan kunvenon, kaj dudek el niaj gegrupanoj poste vizitis la ŝipon hieraŭ (1^{an} de Sept.) kaj ĝuis tre feliĉan tempon kun niaj veturantaj amikoj. Dank' al la kara lingvo kaj al « **Tra la Mondo** » ni adiaŭis ilin kiel amikojn ĝis la reveno, la venontan someron. Kore al vi ».

Ni estos ĝojaj, se nia artikolo pasigis aŭ pasigos tiajn agrablajn momentojn al la lernintoj de K^{no} Comte.

Ni havis aliflanke la agrablan surprizon (**), ricevi n^{on} de « **The Mercury** », el Hobart (Tasmanio), 7^{an} de Aŭg. enhavantan, en longa artikolo pri la pacifismo, duonkolonan analizon pri la interesa artikolo de S^{ro} Barthel pri la *Interŝanĝoj de Infanoj*, kun komentario pri la graveco de tiu kreado por la pacifistoj.

Jen du agrablaj pruvoj pri la disvastiĝo de « **Tra la Mondo** » eĉ en la plej malproksimaj landoj, pri la utileco de ĝiaj informoj, kaj la atento donita al ili eĉ en la nacilingva gazetaro. Ni povus diri *precipe* en la nacilingva gazetaro, ĉar ofte iaj gravaj artikoloj ŝajnas tute ne rimarkitaj de iuj el niaj kunfratoj. Tiel « **Lingvo Internacia** » eĉ ne citis la diritan artikolon pri « **Interŝanĝoj de Infanoj** ». Nia bonega kunfrato ŝajnas iafoje opinii, ke estas interesaj por la esperantistoj nur la artikoloj, kiuj pritraktas gramatikajn demandojn, aŭ en kiuj almenaŭ la nomo Esperanto estas presita. Ĉu vere, ĉar la legantoj estas esperantistoj, ili perdis ĉiun kapablon interesiĝi je tio, kio interesas la aliajn homojn.


Oni povus paroli same pri iuj specialistaj organoj, kiuj, presitaj Esperante, opinias citinda nur tio, kio estas verkita en alia lingvo, ol Esperanto.

Mi insistas pri tiuj aferoj, ĉar « **Tra la Mondo** » estas fondita por helpi la propagandon, ne per artikoloj priesperantaj, sed per dokumentoj skribitaj aŭ bildaj, sciigoj, informoj, kolektitaj per Esperanto, senditaj per esperantistoj. Oni do uzu ilin. Nu, ofte, niaj propagandistoj ne scias utiligi la materialon liveritan al ili de iliaj organoj.

Jus hieraŭ mi akceptis tre sindonan homon, kiu deziris de

Vidu la sekvon sur la paĝo 6^a.

(* Ni forte konsilas al niaj legantoj, ke ili jam mendu la oficialan plenan raporton pri la kongreso, eldonotan de la Centra Esperantista Oficejo, 51, Rue de Clichy, Paris. (** Ni estas tre dankaj al la sendinto, se li bonvolus sin konigi de ni.



ENIRO DE LA VAPORŜIPO « ORELLANA » EN LA BASENON DE LA PALLICE.

La Haveno La Pallice.

La bela haveno de La Pallice estas precipe ŝatata de la grandaj transatlantikaj ŝipoj, pro la tre facilaj enirado kaj elirado. Preskaŭ ĉiuhore, tage aŭ nokte, en bela aŭ ventega vetero, ĉiuj vaporŝipoj, eĉ la plej grandaj, povas eniri la basenon.

« Orellana » prezentata ĉi supre apartenas al la potenca firmo « Pacific Steam Navigation Company » de Liverpool, kiu, la unua el la grandaj navigaciaj kompanioj, regule vizitadis La Pallice.

Ĝiaj vaporŝipoj antaŭe ricevis siajn komercaĵojn kaj vojaĝantojn en Pauillac (Gironde), sed ili estis ĝenataj de la nesufiĉa profundeco de la rivero kaj de la densaj nebuloj tre oftaj en tiu loko.

« Tempo estas mono » estas ja la preferata devizo

de la Angloj. Ĝi estas precipe ĝusta pri tiaj ŝipegoj, kiuj ĉiutage kostas grandan sumon da mono.

Anstataŭiginte *Bordeaux-Pauillac* per *La Rochelle-Pallice*, la ŝipoj de la P. S. N. C. ŝparas almenaŭ unu tagon en la tempo de la veturado al Suda Ameriko kaj denove unu tagon ĉe la reveturado.

Sekvante tiun ekzemplon, la grandaj francaj kompanioj « Chargeurs réunis » kaj « Messageries maritimes » ĵus decidis sendi ĉiutrisemajne kargoŝipojn al la Rochelle-Pallice, por preni komercaĵojn al Ĥinuĵo, Japanuĵo kaj Norda Ameriko. La unua veturado estos efektivigata de la ŝipego « Malte » en la proksima monato (Decembro).

SAM. MEYER, Ŝipmakleristo.

LA INDUSTRIA ORGANIZACIO ĈE LA UNUIGITAJ ŜTATOJ DE AMERIKO.

Sr^o Paul Doumer, la eminenta ŝtathomo franca, kiu, antaŭ ne longe vizitis Unuigitajn Ŝtatojn, faris, post sia reiro, interesan paroladon ĉe la federacio de la francaj industriistoj kaj komercistoj.

Sr^o Doumer revenas de U. Ŝ. precipe kun impresoj de energio kaj potenco. La karaktero de l' U. Ŝ. anaro formiĝis dum la kontraŭstarado: per la armiloj ĝi devis almiti sian teritorion, sian sendependecon; certigi sian unuecon, poste sian disvolvigon, sian disvastigon sur la amerika kontinento, fine sian rolon en la mondo. Tio trempis ĝin, igis ĝin energia kaj kuraĝa, kaj la kuraĝo utilas labore kiel batale. Ĝi donas la memkonfidon, la fidon al la sukceso, la sentimecon.

Oni trovas en U. Ŝ. tiun viran energion kunligitan kun la potenco, la graveco de l' agadrimedoj. Ĉio rilatanta la laboron

estas granda kaj potenca tie, aliskale (alimezure) ol ĉe ni. La ekonomia ilaro, la transportaj rimedoj tie estas pli ampleksigitaj ol ĉe aliaj nacioj; la fervoja relreto estas pli disvastigita ol tiu de la tuta Eŭropo. La fabrikejoj estas pli potencaj kaj pli taŭge organizitaj ol en iu ajn Eŭropa lando.

Estas tiu produktada intensigo — igante malplimultajn la ĝeneralajn kostojn, kaj la uzo de perfektigita ilaro — ŝparigante la manverkadon, fine la akordo (memvola aŭ altrudita) de l' produktistoj, kiuj faras la supereco de la U. Ŝ. a industrio.

Ĉiu el tiuj elementoj, konkludas Sr^o Doumer, meritas altiri la atenton de la francaj industriistoj, kiuj povas trovi, ĉe Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko, ekzemplojn kaj konsilojn.

MERKURO.

Kaprico.

De ALFRED DE MUSSET.

Alfred de Musset estas mortinta de duona centjaro, kaj jam por li komencas la senmorteco. Tiu poeto, kiu venis ĝustatempe, ĉe epoko kiam la franca junularo estis maltrankvila, ne ankoraŭ kapabla gvidi sian vivon, estis akklamata tuj ĉe siaj komencoj. Li estis plivole malgaja, kaj lia maloptimismo ŝajnis resumi la tutan maloptimismon de la tiamaĵ samagularoj. Ha! certe, li estas maltrankvila, li estas senkuragiĝita, ekzistas ombroj en lia naskiĝanta genio. Liaj poezioj: 108; liaj *Comédies & Proverbes* (Komedioj kaj Proverboj): 15; la *Confession d'un enfant du siècle* (Konfeso de ido de l' centjaro); 5 partoj; la *Nouvelles kaj Contes* (Noveloj kaj Rakontoj): 10; les *Mélanges de littérature & de critique* (Miksaĵoj el literaturo kaj kritiko), formas tuton ampleksan, kaj ankaŭ ondiga kaj varia. Jes, ondiga kaj varia, ĉar en siaj verkoj li estas, laŭinspire, poeto, — sed kiom malesperiga! dramverkisto, laŭ la Shakespeare'a maniero; preskaŭ aŭtobiografiisto en la konfeso de ido de l' centjaro; romanisto sagaca sed senluziĝita; kaj fine recenzisto (kritikisto) en sia *Préface de la première édition des contes d'Espagne et d'Italie* (Antaŭparolo de la unua eldono de l' rakontoj de Hispanujo kaj Italujo), daŭrante per la *Lettres de Depuis et Cotenet* (Leteroj de Depuis kaj Cotenet) per la *Études sur la Tragédie* (Studioj pri la Tragio), pri Bajazel, per la *Lettre au Célyen rédacteur du journal le national* (letero al la urbano redaktoro de l' ĵurnalo « le national »), por fini per la parolado por sia akcepto ĉe la Franca Akademio, kie li anstataŭigis Duparty'n.

Nia gazeto: « Tra la Mondo », volis publikigi laŭ la fama

poeto *Un Caprice*, kiun S^{ino} Allan kunportis de Rusujo, kaj kiu estis ludata, unufoje, ĉe la *Comédie française* (teatro de la Franca Komedio) en la jaro 1847, dum plena politika bolado, kaj preskaŭ la antaŭtagon de l' okazaĵoj, kiuj estis renversontaj la dinastion d' Orléans.

Ĝi estas vere aminda kaj subtila flirtaĵo, tra kiu S^{ro} de Chavigny kaj Mathilde sin ĵetas unu la alian la reatakon, ne sen ian senton, same kiel faras la personoj de l' komedioj de Marivaux (1). Tiu sprito estas subtila, kvazaŭ fluganta, kaj la maniero delikatega. Pri tio juĝos niaj legantoj.

Laŭguste, ni ĝin preferas al *On ne badine pas avec l'amour*, (oni ne ŝercas pri l' amo), *les Caprices de Marianne, le Chandelier* (la kandelingo), *Fantazio, Il ne faut jurer de rien* (pri nenio oni devas ĵuri), *Carmosine, Lorenzaccio* kiun Sarah Bernhardt (2) tiel bone enkorpiĝis antaŭ dek jaroj, kaj *Barberine* ludita ĉe la Théâtre-Français, kaj kies ĉefa enludistino, F^{ino} Feyghine mortigis sin dum unu el tiuj malesperaj atakoj, kiujn Alfred de Musset tiel longe laŭdparolis.

EUGÈNE MONTROSIER.

(1) *Delikata verkisto (1688-1746), precipe konata pro kelkaj ĉarmaj komedioj, kiuj elmontras profundan konon de l' homa koro, kaj precipe de la virina karaktero. Sed lia analizo estas ifoje tro subtila, kaj lia stilo nesimpla. Por karakterizi lian dialogon kaj lian metafizikon, oni kreis la vorton marivaudage (marivaux'aĵo).*

(2) *Tutmonda konata franca aktorino.*



PERSONOJ.

S^{ro} DE ŜAVINJI,

MATILDO,

S^{ino} DE LERI.

La agado okazas en la dormoĉambro de Matildo.

SCENO I^a.

MATILDO.

Sola, farante retajon.

Ankoraŭ unu punkton, kaj mi finis.

Ŝi sonorigas; eniras servisto.

Ĉu ĵaniseti sendis iun?

LA SERVISTO.

Ne, sinjorino, ne ankoraŭ.

MATILDO.

Tio estas netolerebla; oni reiru al li; rapidu.

La servisto eliras.

Mi estus devinta preni kiajn ajn pendaĵetojn; estas la oka horo; li sin okupas je sia tualetoj; mi estas certa, ke li venos ĉi tien antaŭ ol ĉio estos preta. Tio prokrastigos min ankoraŭ unu tagon.

Ŝi levigas.

Multe da homoj opinius, ke fari monsaketon sen la scio de sia edzo estas io pli ol romanema. Post unujara edzeco! Kion dirus, ekzemple, S^{rino} de Leri, se tion ŝi sciis? Kaj li mem, kion li pensos pri tio! Nu! Eble li ridos pri la mistero, sed li ne ridos pri la donaco. Kial tia mistero, ja? Mi ne scias; al mi ŝajnas, ke antaŭ li mi ne estus laborinta tiel fervore; tio estus ŝajninta diri: « Vidu, kiel mi pensas pri vi »; tio similus al riproĉo; dum male montrante al li mian laboreton finitan, ĝi estos li, kiu en si diros, ke mi pensis pri li.

LA SERVISTO, enirante.

Oni alportas tion al via Moŝto laŭ ordono de l' juvelisto.

Li donas paketon al Matildo.

MATILDO.

Fine!

Ŝi residiĝas.

Kiam venos S^{ro} de Ŝavinji, antaŭsciigu min pri tio.

La servisto eliras.

Do, kara monsaketo, vian lastan tualeton mi tuj faros al vi. Mi rigardu, ĉu vi estos eleganta kun tiuj ĉi pendaĵetoj? Bonete. Kiel vi estos akceptata? Ĉu vi diros la tutan plezuron, kun kiu oni vin faris, la tutan zorgon, kiun oni havis pri via personeto? Oni ne vin atendas, *fraŭlino* (1). Oni volis vin montri nur kun ĉiuj viaj ornamoj. Ĉu vi ricevos kison rekompence?

Ŝi kisas sian monsaketon kaj haltas.

(1) *Franclingve, la vorto bourse (monsaketo) estas ina; tio komprenigas, kial Matildo amike nomas ĝin « fraŭlino ».*

Kompatindulineto! Ci malmulte valoras; oni ne vendus cin du ormonerojn. Kial do, disigi min de ci, ŝajnas al mi io malĝoja? Ĉu mi ne cin komencis, por cin fini kiel eble plej rapide? Ha! Mi komencis cin pli gaje, ol mi cin finas. Tamen de tiam forpasis nur dek kvin tagoj; nur dek kvin tagoj, ĉu estas eble? Ne, ne pli; kaj kiom da okazaĵoj dum dek kvin tagoj! Ĉu ni alvenos tro malfrue, etulino?..... Kial havi tiajn ideojn? Oni venas, mi kredas; ĝi estas li; li ankoraŭ amas min.

SERVISTO, enirante.

Jen lia Grafa Moŝto, sinjorino.

MATILDO.

Ho! Dio mia! mi metis nur unu pendaĵeton, kaj mi forgesis la alian. Kiel stulta mi estas! Ankoraŭ hodiaŭ mi ne povos ĝin doni al li! Li atendu momenton, unu minuton, en la salono; rapide, antaŭ ol li eniros.....

LA SERVISTO.

Jen estas li, sinjorino.

Li eliras. Matildo kaŝas sian monsaketon.

SCENO II^a.

MATILDO, ŜAVINJI.

ŜAVINJI.

Bonan vesperon, kara mia; ĉu mi ĝenas vin?

Li sidigas.

MATILDO.

Min, Henriko? Kia demando!

ŜAVINJI.

Vi ŝajnas konfuzega, priokupata. Mi ĉiam forgesas, kiam mi eniras ĉe vin, ke mi estas via edzo, kaj tro rapide mi puŝas la pordon.

MATILDO.

Estas en via diro iom da malboneco; sed ĉar estas ankaŭ iom da amo, mi vin kisos malgraŭ tio.

Ŝi lin kisas.

Kio do vi kredas esti, sinjoro, kiam vi forgesas, ke vi estas mia edzo?

ŜAVINJI.

Via amanto, belulino mia, ĉu mi eraras?

MATILDO.

Amanto kaj amiko, vi ne eraras.

Flanken.

Mi sentas deziron doni al li la monujon tian, kiel ĝi estas.

ŜAVINJI.

Kian robon vi portas? Vi do ne eliras?

MATILDO.

Ne, mi volis....., mi esperis, ke eble.....

ŜAVINJI.

Vi esperis?..... Kio estas do?

MATILDO.

Vi iras al la balo? Vi estas belega.

ŜAVINJI.

Nemulte, mi ne scias, kiu estas kulpa el mi aŭ ella tajloro, sed mi jam ne havas mian regimentan aspekton.

MATILDO.

Nekonstantulo! Vi ne pensas pri mi, rigardante vin en tiun ĉi spegulon.

ŜAVINJI.

Bone! pri kiu do? Ĉu mi iras ĉe la balon por danci? Al vi mi ĵuras ja, ke tio estas tedaĵo, kaj tien mi trenas min, ne sciante kial.

MATILDO.

Nu! restu, mi petegas. Ni estos solaj, kaj mi diros al vi....

ŜAVINJI.

Ŝajnas al mi, ke via horloĝo trorapidas; ne povas esti tiel malfrue.

MATILDO.

Oni ne iras al la balo je tiu ĉi horo, kion ajn montras la horloĝo. Antaŭ nelonge ni forlasis la manĝotablon.

ŜAVINJI.

Mi diris, ke oni jungu; mi devas viziti iun.

MATILDO.

Ha! Tio estas alia afero. Mi..... mi ne sciis..... mi kredis.....

ŜAVINJI.

Nu?

MATILDO.

Mi konjektis..... el tio, kion vi diris..... Sed la horloĝo bone iras; estas nur la oka. Kun mi restu momenteton. Mi havas malgrandan surprizon por fari al vi.

ŜAVINJI, *levigante*.

Vi scias, kara, ke mi vin lasas libera, kaj vi eliras, kiam plaĉas al vi. Vi opinios justa, se tio estos reciproka. Kian surprizon vi destinas al mi?

MATILDO.

Nenion; tiun ĉi vorton mi ne diris, mi kredas.

ŜAVINJI.

Mi eraras do; mi kredis ĝin aŭdi. Ĉu vi havas ĉi tie la valsojn de Strauss? Ilin pruntedonu al mi, se vi ne ludas ilin.

MATILDO.

Jen estas ili; ĉu vi volas ilin nun?

ŜAVINJI.

Sed, jes, se tio ne vin ĝenas. Pri ili oni min petis por unu-du tagoj. Ne longe mi vin senigos je ili.

MATILDO.

Ĉu ili estas por Srino de Blenvilo?

ŜAVINJI, prenante la valsojn.

Vi diras? Ĉu vi ne parolas pri S^{ino} de Blenvilo?

MATILDO.

Mi! ne. Mi ne parolis pri ŝi.

ŜAVINJI.

Tiun ĉi fojon mi ĝuste aŭdis.

Li residigas.

Kion vi diras pri S^{ino} de Blenvilo?

MATILDO.

Mi pensis, ke miaj valsoj estas por ŝi.

ŜAVINJI.

Kaj kial vi tion pensis?

MATILDO.

Sed ĉar... ĉar ŝi ŝatas ilin.

ŜAVINJI.

Jes, kaj mi ankaŭ; kaj vi ankaŭ, mi kredas. Estas unu precipe; kiel ĝi estas do? Mi ĝin forgesis... kiel ĝi do diras?

MATILDO.

Mi ne scias, ĉu mi pri ĝi memoros.

Ŝi sidigas ĉe l' fortepiano kaj ludas.

ŜAVINJI.

Ĝi estas precize tio. Ĝi estas ĉarma, dia, kaj vi ĝin ludas kiel anĝelino, aŭ pli ĝustadire, kiel vera valsemulino.

MATILDO.

Ĉu tiel bone kiel ŝi, Henriko?

ŜAVINJI.

Kiu, ŝi? S^{ino} de Blenvilo? Ŝi plaĉas al vi, laŭŝajne.

MATILDO.

Ho! Ne multe. Se mi estus viro, ne estas ŝi, kiu konfuzigus mian kapon.

ŜAVINJI.

Kaj vi estus prava, sinjorino. Neniam viro devas lasi sia kapon konfuziĝi, nek pro virino nek pro valso.

MATILDO.

Ĉu vi intencas ludi hodiaŭ vespere, amiko?

ŜAVINJI.

He! kara mia, kian ideon vi havas? Oni ludas, sed oni ne intencas ludi.

MATILDO.

Ĉu vi havas ormonerojn en viaj poŝoj?

ŜAVINJI.

Eble. Ĉu vi deziras kelkajn?

MATILDO.

Mi, Dio granda! kion vi volas, ke mi faru per ili!

ŜAVINJI.

Kial ne? Se mi tro rapide malfermas vian pordon, mi ne malfermas, almenaŭ, viajn tirkestojn, kaj eble mi estas duoble malprava.

MATILDO.

Vi mensogas, sinjoro, antaŭ ne longe mi rimarkis, ke vi estis malferminta ilin, kaj vi min lasas tro multe riĉa.

ŜAVINJI.

Ne, karulino, tiel longe kiel estos malriĉuloj. Mi scias, kiamaniere vi elspezas vian riĉecon, kaj mi petas, ke vi permesu al mi esti bonfarema per viaj manoj.

MATILDO.

Kara Henriko! Kiel nobla kaj bona ci estas! Diru, ĉu ci memoras pri iu tago, en kiu ci havis ŝuldeton pagotan, kaj en kiu ci plendis, ke ci ne havas monsaketon?

ŜAVINJI.

Kiam do? Ha! Tio estas ĝusta. La vero estas, ke, kiam oni eliras, fidi al poŝoj, kiujn tenas nenio, estas io malagrabla...

MATILDO.

Ĉu ci ŝatus ruĝan monsaketon kun nigra strieto?

ŜAVINJI.

Ne, mi ne ŝatas la ruĝkoloron. Per Dio! ci pensigas al mi, ke precize mi havas de hieraŭ monsaketon tute novan; ĝi estas donaco. Kion vi pensas pri ĝi?

Li eligas monsaketon el sia poŝo.

Ĉu ĝi estas malvulgara?

MATILDO.

Montru; ĉu vi volas ke mi ĝin rigardu?

ŜAVINJI.

Jen.

Li ĝin donas al ŝi; ŝi ĝin rigardas, poste redonas ĝin al li.

MATILDO.

Ĝi estas tre beleta. Kiukolora ĝi estas?

ŜAVINJI, ridante.

Kiukolora? La demando estas bonega.

MATILDO.

Mi eraras... Mi volas diri... Kiu ĝin donis al vi?

ŜAVINJI.

Ha! Tio estas tro ridiga! per mia honoro! viaj distraĵoj estas adorindaj.

Daŭrigota.


Tradukita de

JOHANINO FLOURENS,

Honora Membrino de la E. V. K.

La Mireginda tekruĉo.

JAPANA FABELO.



Antaŭ longe, tre longe....

Antaŭ longe, tre longe, en la templo de Morinji en la provinco Kotsuke vivis maljuna pastro.

Tiu maljuna pastro tre ŝatis la ceremonion por prepari kaj trinki la teon faman kiel tiu de Chanoyu; vere, direkti tiun ceremonion estis lia plej granda plezuro.

Ian tagon li havis la ŝancon trovi en la butikoj de revendisto tre belan malnovan tekruĉon, kiun li aĉetis kaj kunportis kun si hejmen, tute ĝoja pro ĝia bela formo kaj arteca ŝajno.

La morgaŭan tagon li ekzamenis sian novan akiraĵon, kaj longatempe sidadis turnante ĝin ĉiuf flanken, kaj ĝin admirante.

« Vi estas regula belulo, vere vi estas tia », li diris, « mi invitos miajn amikojn por la Chanoyu ; kaj kiom ili miros, vidante tiel belegan tekruĉon, kiel vi estas ! »

aperis harhava kapo, ĉe la kontraŭa flanko montriĝis bela vila vosto, post nelonge kvar piedoj montriĝis ; samtempe bela felo ŝajnis laŭgrade tegi la supraĵon de la tekruĉo. Fine saltante de la kesto, ĝi komencis saltedanci tra la ĉambro, simila al melo.

Tri junaj lernantoj, kiuj studadis en la apuda ĉambro, aŭdis bruon, kaj kiam unu el ili rigardis tra la glitpordo, kiom multe li miris, vidante la tekruĉon kun kvar piedoj, kiu dancas tien ĉi kaj tien en la ĉambro.

Tiam li ekkriis : « Ho ! kiom terura estas tia afero ! La tekruĉo fariĝis melo ! »


— « Kio, — diris la dua lernanto, — ĉu vi pensas, ke la tekruĉo fariĝis melo ? Kia malspritaĵo ! » Tion dirante, li puŝis sian kunulon aliflanken, sed li ankaŭ ekrigardinte ĝin, tre miregis pro tio, kion li vidas, kaj akre ekkriis :

— « Ĝi estas fantomo, ĝi venas al ni, ni foriru ! »

La tria lernanto ne




Sed la tekruĉo ekridis kaj diris : « Ne estu do limiĝita. »



Tiam li ekkriis : « Ho kiom terura estas tia afero ! La tekruĉo fariĝis melo ! »

Li metis sian trezoron sur la kovrilon de kesto, kie li povos pli facile rigardadi ĝin, kaj sidante, admiri ĝin; kaj li projektis, kiom da gastoj li invitos. Post nelonge li ekdormetis, kaj komencis balanci sian kapon, kiu fine falis antaŭen, sur la tablon dormegante. Tiam okazis mireginda aliformiĝo. Le tekruĉo komencis movi sin: ĉe la beko





estis tiel facile timigebla.

— «Nu! tio estas plivole ŝercaĵo, — li diris; — kiel tiu estaĵo saltas, ĉu vi estas certa? Mi vekos la majstron, kaj li vidos.»

Tiam li eniris la ĉambron, kaj skuis la majstron ekkriante: «Vekiĝu! majstro, vekigiĝu! okazas stranga afero.»

— «Kio estas? — diris la maljunulo, dormeme frotante siajn okulojn, — kia bruegulo vi estas!

— Ĉiuj estus bruemaj, kiam okazas tiel strangaj aferoj, kiel tiu ĉi. Nur rigardu, majstro, via tekruĉo havas piedojn kaj ĝi kuras tien ĉi kaj tien!

«Kion! kion! kion vi diras? — demandis denove la pastro, — «la tekruĉo havas piedojn! Kio estas tio? Mi rigardu!»

Sed dum tiu tempo, kiam la pastro tute vekigiĝis, la tekruĉo estis repreninta sian ordinaran formon, kaj kuŝis kviete denove sur la kesto.

— «Kiel vi estas frenezaj, junuloj! — diris la pastro; — la tekruĉo kuŝas sur la kovrilo de la kesto; certe nenio estas

Antaŭ ol kuŝiĝi, li rigardis ankoraŭ ĝin.....



...la tekruĉo estis repreninta sian ordinaran formon....



Ne sole ĝi dancis per siaj kvar piedoj, sed marŝis sur streĉila ŝnuro.

stranga en tio! Ne, ne; mi aŭdis pri rulilo de kukajisto, je kiu kreskis du flugiloj, kaj kiu forflugis, sed de la tempo, kiam mi vivas, neniam mi aŭdis pri tekruĉo, kiu dancis sur siaj propraj piedoj! neniam vi tion kredigos al mi.»

Sed pro ĉio tio la pastro estis en iom malkvieta spiritstato, kaj pensis pri tiu okazintaĵo la tutan tagon. Kiam alvenis la vespero, kaj kiam li estis sola en sia ĉambro, li prenis la tekruĉon, plenigis ĝin je akvo, kaj metis ĝin sur fajran karbon por boligi la akvon, intencante fari teon. Sed tuj kiam la akvo ekbolis:

— «Estas varme! estas varme!» ekkriis la tekruĉo, kaj ĝi risortigis de la fajro.

— «Helpon al mi! helpon!» ekkriis la pastro timigita kaj duonfreneza.

Sed, kiam la lernantoj alvenis, por helpi al li, la tekruĉo estis repreninta sian naturan formon; tiam unu el ili, ekkaptinte bastoneton, ekkriis:

— «Ni baldaŭ ekscios, ĉu ĝi estas viva aŭ ne?» kaj li komencis bati ĝin kiel eble plej forte. Certe ne estas vivo en tiu afero sed nur metala resonado! resonado! okazita de la fortaj batoj.



Tiam la maljuna pastro tre bedaŭris, esti aĉetinta tiun malican tekruĉon, kaj li pripensis, kiamaniere li povos senigi sin je ĝi, kaj li pensis, ke nur la kaldronisto povas tion fari.

«Li estas la taŭga viro» pensis la pastro. La kontrakto estis post nelonge interkonsentita, la kaldronisto aĉetis la tekruĉon por malmultaj kupraj moneroj, kaj kunportis ĝin hejmen kontenta pro sia akiraĵo.

Antaŭ ol kuŝiĝi, li rigardis ankoraŭ ĝin, kaj trovis ĝin ankoraŭ pli bela ol la unuan fojon. Tiam li kuŝiĝis, por dormi en la plej bona spiritstato.

Meze de agrabla sonĝo subite la kaldronisto leviĝis, kredante ke li aŭdis iun, kiu moviĝas en la ĉambro, sed malferminte la okulojn, kaj ĉien rigardinte, li vidis nenion.

«Tio estis nur sonĝo, mi supozas», li diris en si mem, kaj li turnis sin, por dormi denove.

Sed denove li estis interrompita de iu, kiu alvokis: «Kaldronisto! kaldronisto! leviĝu! leviĝu!»

Tiun ĉi fojon li risortiĝis tute vekite, kaj tiam li vidis la tekruĉon kun kapo, vosto, piedoj, haraĵo kiel melo, kiu fiere marŝas tien ĉi kaj tien en la ĉambro.

«Fantomo! Fantomo!» ekkriis la kaldronisto. Sed la tekruĉo ekridis kaj diris:

«Ne estu do timigita, mia kara kaldronisto, mi ne estas fantomo sed nur tekruĉo. Mia nomo estas Bumbuku-Chagama, kaj mi alportos la feliĉon al tiu, kiu bone agos kun mi, sed, nepre, mi ne ŝatas, ke oni metas min sur la fajron, kaj ke oni batas min per bastonetoj, kiel tio okazis al mi en la templo hieraŭ. «Kiel mi povos plaĉi al vi? — demandis la kaldronisto, — ĉu mi devos loki vin en keston?»

—Ho ne, ne! — respondis la tekruĉo, — mi ŝatas bongustajn manĝaĵojn, kaj kelkafoje iom da vino por trinki, ĝuste kiel vi. Ĉu vi volos konservi min en via domo, kaj nutri min? Kaj, tial ke mi ne volas esti ŝarĝo por vi, mi laboros por vi laŭ ia maniero, kiu plaĉos al vi».

Tion akceptis la kaldronisto.

La morgaŭan matenon, li preparis grandan festenon por Bumbuku, kiu tiam tiel parolis:

«Mi estas nepre mireginda kaj perfekta tekruĉo, kaj mi konsilas al vi, kunporti min kun vi tra la lando, kiel kuriozan vidaĵon, kaj montri min kun kantoj kaj muziko.


La kaldronisto, opiniante ke tiu avizo estas bona, aranĝis montrejon, kiun li nomis La Bumbuku-Chagama.

Tuj la afero de la tekruĉo ricevis grandan sukceson, ĉar ne sole ĝi dancis per siaj kvar piedoj, sed marŝis sur streĉita ŝnuro, kaj plenumis multe da ekvilibraĵoj, kaj finis profunde reve-rencante al la vidantaro, kaj petante ĝian helpon.

La famo de tiuj lertaj agoj post nelonge disvastiĝis, kaj la teatro ĉiutage pleniĝis tute, ĝis fine eĉ la Princoj el la lando ordonis al la kaldronisto, ke li kunportu sian tekruĉon al ili, kaj tiu vidaĵo ĝojigis la princinojn kaj la sinjorinojn de la kortego.

Fine, la kaldronisto trovis sin sufiĉe riĉa, kaj li forlasis la negocon, kaj dezirante, ke lia fidela tekruĉo ripozu, li alportis ĝin kun granda parto de sia riĉeco al la templo de Morinji, kie oni konsideras ĝin kiel multe valoran trezoron kaj, oni diras, eĉ kiel sanktulon (1).

D^{ro} GAMBIER.



LITERATURA KRONIKO.

De kelke da tempo, Esperanto suferas ripetatajn atakojn; kaj la valoro de la atakantoj, ilia famo, provas, ke oni ne plu konsideras Esperanton kiel neatentindan aferon. Antaŭ tri monatoj, ĝi estis Jules Claretie, franca akademiano, kiu en *Le Temps* manifestaciis sian kontraŭemon al tiu «ĵargono», ne taŭga kiel literatura lingvo. Per respondo dokumentita «ĝentila kaj interesa» laŭ la esprimo mem de S^{ro} J. Claretie, nia ĉefredaktoro estis sufiĉe feliĉa por instigi lin enkonduki, en sian sekvintan semajnan artikolon, vortojn tre ŝatindajn sub tia plumo. Iom poste, alia franca akademiano Henri Lavedan, malice parolis pri Esperanto. La aludo ne estis malamika, kontraŭe. Bedaŭrinde malĝentila letero sendita al la aŭtoro incitis tiun ĉi, kiu verkis tre malfavoran artikolon. Tria, pli dolĉa artikolo, sekvis novan pli lertan leteron.

Tio montras, ke ĉiu ne estas kapabla respondi al ĉiu atako. Tute malsame estas refuti ian ajn kontraŭulon, aŭ eminentan literaturiston, klerulon, kiu ne kontentigas sin per maldeklataj paroloj aŭ neprecizaj argumentoj.

Pri la rilato de la literatureco de Esperanto, kaj la patruja vidpunkto ofte konsiderita lastatempe, la Francoj havas bonegan argumenton, citante la tradukon de «Unua Ĉapitro de miaj memorskriboj» de S^{ro} A. Montrosier, laŭ François Coppée, alia franca akademiano, kiu ne estas suspektinda pro malamo al la patrujo kaj al la bonfamo de la francaj lingvo kaj literaturo. Tamen, en antaŭparolo skribita sub sia kontrolo, li konsentas pri la taŭgeco de

Esperanto por antaŭgardi la naciajn lingvojn kontraŭ la ŝanĝoj devenantaj de la pli kaj pli intimaj rilatoj en la diversaj popoloj. (2)

Aliparte ni ricevas ĉiutage novajn pruvojn pri la tradukebleco en Esperanton, ĉar la bonaj Esperantaj verkoj plimultiĝas.

Veran ĝuon donis al mi la legado de du el ili: *la Virineto de Maro*, de D^{ro} Zamenhof mem, kaj *la Faraono*, de Kabe (1^a Vol.).

En la unua montriĝas en sia tuta pureco nia lingvo, tiel esprima per simplaj rimedoj, tiel riĉa je nuancoj. La poezia ĉarmo de la delikata rakonto de Andersen sin trovas tute en la traduko de nia majstro, vera modelo proponinda al niaj verkistoj. Ilustraĵoj de F^{ino} Hilda May Brodie, el Glasgow, aldonas ĉarmon al la plezuro de la legado. (3)

En *la Faraono*, ni ne plu estas, kiel kun la virineto de maro, en la mondo de la feinaj mirindaĵoj. Kun Prus', la aŭtoro de la rimarkinda originala verko, D^{ro} Kabe nin transportas en la antikvan Egiptujon, kaj revivigas por ni epokon precipe konitan per la grandiozaj monumentoj respektitaj de la tempo kaj de la mano de l' Homo — ofte pli detruema, ol detruantaj estas la elementoj; per la surskriboj malfacile deĉifritaj de lertaj specialistoj; per la elfosadoj pacience daŭrigataj ankoraŭ nune, kaj iom post iom liverantaj la sekretojn de malaperinta civilizacio.

Ni reparolos pri tiu tre interesa verko, kiam la 2^a Vol. aperos. (4)

(1) Eldonita ĉe T. Hasegawa, en Tokio (Japanujo), esperantigita laŭ anĝla traduko de «Review of Reviews», London. (2) 75 c. (30 Sd.) ĉe «Tra la Mondo». — (3) Fr. 1,50 (60 Sd.); (4) 2 fr. (80 Sd.), ambaŭ ĉe Hachette kaj K^o.

Tute alispeca estas *Kastelo de Prelongo*, originala romano de D^{ro} Vallienne, plena je aventuroj strangaj, unuj pli neverŝajnaj, ol la aliaj. Ĝi apartenas al la tipo nomita romano ĉe la pordistino, en kiu amasiĝas amoj, perfidoj, ŝteloj, bruladoj, meze de la plej neatenditaj okazintaĵoj. La stilo estas korekta, sed tamen malpli simpla ol tiu de la du antaŭaj verkoj. Kelkaj tro longaj vortoj kunmetitaj malfluigas ĝin. Sajnas al ni ankaŭ, ke la prepozicio da en «senigita da» ne estas ĝuste uzita. (1)

Ni preferas multe al tiu dika volumo la ĉarmajn *Rakontojn al mia belulino*, de Jean Bach-Sisley, tradukitajn de S^{ro} L. Touchebœuf. Tiuj dekdu noveloj, kies ĉiu el ili rilatas unu monaton de la jaro, estos tre ŝatataj de la virinoj, al kiuj ili estas speciale dediĉitaj. Ĝia stilo estas bonega, kaj la legado tiel facila, kiel alloga. (2)

Tre leginda ankaŭ *Morala edukado de la popola infano*, parolado farita de S^{ino} Baronino de Ménéil dum la Kembriĝa Kongreso, eldonita france kaj Esperante, kun bildoj, de Esperantista Centra Oficejo. (3)

Fine rekomendinda por la grupoj, kaj por tiuj, kiuj volas havi eĉ Esperante, la 4^a volumeto *Kelkaj Floroj Esperantaj*, kun 22 bildoj, de A.-J. Witteryck. (4)

La Teatraĵoj estas tre multenombraj kaj la ludamantoj havas nur embarason pro elekto inter *Angla Lingvo sen Profesoro*, bonege tradukita de Gaston Moch, laŭ la tiel spritplena komedio de Tristan Bernard (5); *la Rompantoj*, kvin originalaj monologoj de Pujula Valjes kun 5 bildoj (5); *Solo de Pluto* kaj *Kial ili estas famaj*, amuzaj monologoj (la dua ludita sukcese en Kembriĝo) tradukitaj de F. Doré (6); *la Nevo kiel Onklo*, de Schiller, esperantigita de Charles Stewart (7); *Edziĝo malaranĝita* (8) de Vicente Inglada, nia distinginda hispana samideano. Tiu lasta verko, la unua eldonaĵo de «Eldona Hispana Societo», originale verkita, celas ridigi, kaj vere oni ne povas deteni sin ĝin fari legante la dialogon inter S^{ro} Paserkapo, la terura kuracisto, dramaŭtoro, asekuristo... kaj patro de la ĉarma F^{ino} Kabineto, kaj S^{ino} Timoplana, la plendinda amanto de tiu ĉi lasta.

(1) 1,40 Sm. ĉe Hachette k. K^o. — (2) 80 Sd. ĉe P. E. S. — (3) 0,40 Sm. 51 Rue de Clichy, Paris. — (4) 0,10 Sm. *Librejo Witteryck*, 4 Nouvelle Promenade, Bruges, Belgique. — (5) 40 Sd. ĉe Hachette k. K^o. — (6) 0,24 Sm. ĉe la librejo Warnier. — (7) 40 Sd. ĉe B. E. A. — (8) 0,20 Sm. ĉe S^{ro} Rafael Duyos Buenavista 21, Valencia, Hispanujo. (E. H. S.)

«Espero» la bela poezio de D^{ro} Zamenhof, daŭrigas inspiri la muzikistojn. Post la kvazaŭ religia ario de Adelsköld, tiel taŭga por valorigi kantan talenton kaj belan voĉon, venis la muziko de de Ménéil, pli populariĝebla, kaj kiu, ja, tre rapide populariĝis. La bedaŭrata Motteau, verkis ankaŭ ŝatatan arion. Nun eliris 2 novaj, unu en Germanujo, alia en Flandrujo, kiu, la lastan, ni enpresas hodiaŭ. Ni ne devas forgesi arion tre gajan kaj marŝigan, uzatan ĉe multaj francaj grupoj. Sendube, multaj ankoraŭ venos, ĉiu havanta specialan karakteron. Oni devas ĝoji, ke la vortoj de nia majstro estas tiel ĉeestantaj en la spirito de la esperantistoj.

Tio obligas esperi ke, retrograndigante, se ne la tuta mondo almenaŭ la esperantistaro ĝuos «sanktan harmonion».

Fervora samideano, S^{ro} Julius Prohazka, bohema instruisto, verkis interesan Paradan marŝon je l' honoro de D^{ro} Zamenhof, okaze de la dudekjara jubileo.

LEGADAMIKO.

Esperanto en la Armeo. — La fama angla generalo Lord Roberts, akceptis la vicprezidantecon de «Brita Esperantista Asocio». La eminenta franca generalo Langlois ankaŭ esperantemiĝis.

«Armée & Democratie» (1, rue d'Ouessant, Paris), militista ĉiudimanĉa revuo, legata de tre granda nombro da oficiroj kaj suboficiroj, komencis, la 8^{an} de Septembro, serion da artikoloj tre dokumentitaj pri Esperanto, konsiderata je triobla vidpunkto: militistaro, maristaro, Ruĝa-Kruco. Tiuj artikoloj estos tre utilaj por la personoj, kiuj intencas paroli en la militaj rondoj pri Esperanto.

En «Armée et Marine» (Francujo), «Krig & Fred.» (Danujo) aperis ilustritaj artikoloj pri diversaj temoj.

Nia fervora samideano, Kapo Fortin daŭrigas sian ageman propagandon en Madagascaro, helpata de «Le Petit Courrier» en kiu, nun, li faras Esperantan kurson. Gratulojn kaj dankojn al ambaŭ. En la 3 kazerno de Angers (Fr.) okazos Esperantaj kursoj, *post peto de la militestroj*.




Libramantoj atentu.

Sendu simplan karteton k. literoj U. B. al S^{ro} Philippe, Esp. kons. en Aubry (Nord) Francujo, kaj vi ricevos detalajn klarigojn pri nova esperanta gazeto kiu baldaŭ aperos «La Unuiĝo de l' Bibliopiloj» (Direktore: L. Mopty en Arras, P. de C.), kiu povos tre utili al vi.

Historio sen paroloj.



KONKURSO. — Niaj gelegantoj nin sendu klarigojn pri la 3 subaj amuzantaj bildoj (30 liniojn maksimume en 3 partoj). Premioj ĝis valoro de 30 frankoj estos donacataj al la plej spritaj.



De l'Aŭtomobila Klubo de Francujo, 2^{an} de Julio.

La Ĉirkaŭo de Seine Inférieure, sur kiu estis disputata la dua Granda Premio de l'A. C. F. havas formon triangulan, kies pintoj estas ĉe Neuville, je 2 km. de Dieppe, kie estis la tribunoj, Londinières kaj Eu. Ĝi mezuris 77 km. kaj estis surirata dek fojojn t. e. 770 km. Ebena ĝenerale kun kelkaj deklivoj, ĝi estis tre « rapida ».

Tiu ĉi jaron, la komisiitaro de l'A. C. F. anstataŭ igi kuradi veturilojn malpli pezantajn ol 1000 kgoj, decidis apleni regularon rilate al la konsumado.

La regularo je pezo igis progresadi multe la metalurgion kaj fabrikadon de specialaj ŝtaloj; sed se la materioj progresadis, oni devas konfesi, ke rilate al la efikeco (1) teknika de l' motoro, neniu progreso aperis. Ĉiujare la motoroj estis pli kaj pli potencaj; sed ĉu la efikeco, krom la malpezeco, progresadis multe? ne.

La sporta komisiitaro do decidis tion ĉi: Konsiderante aŭtomobilon kiel transformatoron de energio, oni donu al ĉiu konkuranto saman kvanton da energio je la punkto de eliro de la transformadoj. Tiu, kiu estos unua en tiuj ĉi kondiĉoj, estos tiu, kiu sciis perdi malpli da tiu precioza energio tra ĝiaj multaj transformadoj kaj diversaj transmetadoj de l' movo. Do, pli bona motoro, pli bona karburatoro, pli bona ŝanĝilo de rapidumoj, pli bona transmetilaro. Jen tio, kio devenos de la Granda Premio.

Oni do trudis al la konkurantoj unu solan kondiĉon: ne konsumi pli ol 30 litrojn da petrolesenco por 100 kilometroj.

Klariginte la regularon, ni rigardu nun al la kurado mem: 37 veturiloj ĉeestis la foriron inter la sesa kaj sesa kaj duono matene, kaj tuj la batalo elŝajnis inter la *F.I.A.T.-aj*, la *Lorraine-Dietrich* de Duray kaj la *Renault* de Szisz. Dum la tri unuaj rondiroj, Wagner, sur *F.I.A.T.* estis ĉe la unua vico, sed akcidento eligis lin el la kurado, kaj Duray sur *Lorraine-Dietrich* direktis la iradon. La 5^{an}, 6^{an}, 7^{an} kaj 8^{an} rondirojn li estis unua, kaj la venko ŝajnis certa por li, kiam bedaŭrinda akcidento eligis lin el la batalo: kuglo rompita en la ŝanĝilo de rapidumoj. Estis nur en vico *Nazzaro* sur *F.I.A.T.* kaj *Szisz* sur *Renault*, la unua kun kelkaj minutoj de antaŭeco je la dua. Estis momento de angoro (2) por la miloj da rigardantoj ĉeestantaj l' alvenon. *Szisz* pasis unua la foston de celo; sed *Nazzaro*, foririnte naŭ minutojn post li povis ankoraŭ lin venki. Tio okazis, kaj du minutojn nur post la alveno de *Szisz*, la Italo pasis triumfe la linion de alveno meze de tre popolaj aplaudadoj.

Szisz, klasifikita dua, estis sekvata tre proksime de Baras sur *Richard-Brasier*, la 4a estis Gabriel sur *Dietrich*, la 5a kaj 6a estis Caillois kaj Rigal sur *Darracq*. La venkinto *Nazzaro* uzis daŭron de 6h46'33" t. e. faris mezspaco, 113 km 600 hore: la plej alta mezspaco suririta en kurado ĝis hodiaŭ. La firmo *F.I.A.T.* kaj ĝia kuristo *Nazzaro* estis la karuloj de la

venko, tiu ĉi jaron. Tri venkoj, Targa Florio, Pokalo de la Germana Imperiestro kaj Granda Premio estas sukcesoj tiom pli belaj, ke la regularo de tiuj ĉi kuradoj estis malsamaj. Tiuj venkoj estas precipe venkoj de organizado, la inĝenieroj de la itala firmo ne timas penadon kaj elspezon por gajni, kaj ĉio estas kalkulita por tiu celo.

Ni gratulu do varme la italan industrion, kiu tre meritis tiun venkaron pro sia obstino kaj laboro; sed ni konstata, ke se la franca industrio ne estas kiel kutime la oficiala venkinto, ĝi estas la kvazaŭ-venkinto per la belega kurado de *Duray* kaj tiu ĉi fakto, ke ĉiuj veturiloj klasifikitaj de la dua ĝis la dekdua estas francaj.

La Esperantistoj ĉe la Granda Premio.

Rilate al Esperanto ĉe tiu kurado, jen kelkaj originalaj sciigoj:



« LA KAMPING »

Nia gazeto estis oficiale riprezentata, ĉar la sporta redaktoro de « T. I. M. » estis komi-aro oficiala de la Aŭtomobila-Klubo de Francujo (A. C. F.).

Estis esperantistoj ĉe la Ĉirkaŭo! Unu grupano pariza renkontis ĉe Dieppe tri aliajn samideanojn; kaj, kompreneble, kelkaj grupanoj de la nemalproksimaj urboj Le Havre, Rouen, Amiens kaj Eu ĉeestis, kaj ankaŭ multaj nefrancoj. Mi do estas certa, ke, dum la tondro de la motoroj trapasis aeron, aliaj pli dolĉaj sonoj estis aŭdeblaj, kaj ke la belsona Esperanto estis certe multe parolata en tiu ĉi tago kuniganta tiujn ambaŭ ideojn, kiuj estas karaj al mi: Sporto kaj Esperanto!

L. DE GUESNET,

Korespondanto de

« Internacia Scienca Asocio »

La « Kamping » : Tendsporto.

Tiu sporto, tre moda, multe pli ampleksigis de la disvastiĝo de la aŭtomobilismo. Estas vere agrable iri laŭ sia fantazio, ĉu ĉevalveturilo, ĉu aŭtomobile, ne bezonante zorgi pri la fervojaj horaroj; halti kie ajn oni deziras, aŭ apud murmuretanta rivereto, aŭ en freŝa arbaro, por starigi la tendojn, mokante pri la ekspluatemaj hotelistoj.

Vera fonto de sanigaj ĝuoj estas tiu sporto, kiun pli detale pritraktos nia kompetenta sporta kunlaboranto.

T. L. M.



(1) Vortaro Teknika Verax, fr. Rendement.

(2) Vortaro Teknika Verax, fr. angoisse = korprenado.

La prezo de la Vortaro estas 2 fr. 50 = 1 Sm.

POR LA TURISTOJ.

La bela gvidlibro ilustrita « La Departemento Ain », eldonita de la Publika Esperanto-Ofico de Bourg kun la helpo de la Iniciata Sindikato de Ain estas rimarkinda ne nur pro la beleco kaj zorgo de la eldono, la intereso de la regiono priskribita, kaj montrata per belaj bildoj, sed ankaŭ pro la praktikaj sciigoj en ĝi tenataj. Speciale atentinda estas la organizo de koresponda sistemo por la neesperantistoj. Ni ĝin rekomendas al ĉiuj grupoj kaj societoj esperantistaj.

Tiuj ĉi povos ricevi senpagajn ekzemplerojn laŭ peto, de la gvidlibro, se ili promesas ilin uzi kiel eble plej bone por la propagando, disdonante ilin en ĉiuspecaj esperantistaj kunvenoj.

Izoluloj povos ricevi ekzempleron laŭ peto akompanata de 15 cent (6 Sd.) por la poŝtaj elspezoj.

Oni skribu al « Esperanto-Ofico » Bourg, Ain, Francujo.

Senkompara Regiono por Turistoj, gvidlibro pri la kontioj (counties) York, Durham, Northumberland, Cumberland kaj Westmoreland. Ĝi estas eldonita oficiale de la North Eastern Railway, dank' al la penadoj de la senlaca G. D. Buchanan, el Glasgow, fabrikanto de l' bonega Viskio Esperanto. La *Kⁱⁿ ĝin sendos ĉien, laŭ peto poŝtkarte.*

Oni petu, aŭ mendu, kaj uzu ambaŭ propagandilojn.

Ekvilibro de l' korpoj.

Korpo estas en ekvilibro, kiam ĝia pezocentro troviĝas vertikale super ĝia fundamento. Por konservi tie la pezocentron, oni vidas dikventrajn personojn klini la buston malantaŭen, dum iu, kiu portas grandan ŝarĝon sur la dorso, klinas sin kiel eble plej antaŭen.



Fig. 1.

B. Eksperimenton pli mirigan, sed iom pli malfacilan, oni faras per botelo, kudrilo, monero, du ŝtopiloj kaj du forketoj. (Fig. 2.) Oni ŝtopas la botelon per unu el la ŝtopiloj, kaj meze en la korkon oni bone enigas kudrilon.




Fig. 2.

Post tio oni prenas alian ŝtopilon, kaj oni fiksas en ĝin je la du flankoj forketon, kiel eble plej simetrie. Dume oni tenas per la maldekstra mano la moneron sur la pinto de l' kudrilo, kaj oni metas la korkon sur la moneron, tiamaniere ke tiu ĉi eniĝu en foseton, faritan antaŭe en la ŝtopilo. Se la eksperimento estas bone preparita kaj se oni estas aginta sufiĉe lerte, la forketoj restadas en ekvilibro kaj povas eĉ rondiri ĉirkaŭ la kudrilo.

C. Ankoraŭ pli mirinda eksperimento estas la sekvanta. Oni prenas du korkojn kaj tratranĉas ilin




Fig. 3.


kiel eble plej ĝuste meze, laŭlonge. Oni fiksas simetrie ĉiun duonon sur forkon, tiamaniere ke ĉiu duono da korko formu ĉirkaŭ 85 gradan angulon kun la forko. Nun delikate oni metas la centron de la telero sur la pinton de l' kudrilo, kiu estas fiksita en

la korko de l' botelo. Poste oni pendigas, tenante la teleron per la maldekstra mano, la forketojn ĉirkaŭ la telero, saminterspace unuj de la aliaj, kaj baldaŭ la forketo kaj la telero pendas en ekvilibro, kaj prezentas la mirindan vidaĵon kiel tie ĉi flanke. Oni povas turni — sed antaŭzorge — la tutan aparaton.

Denseco de l' fluidaĵoj.

Oni prenas du glasojn de vino, kaj plenegigas la unuan je ruĝa vino, la duan je akvo, kaj oni anoncas, ke oni translokigos la vinon en la glason enhavantan akvon, kaj la akvon en la glason enhavantan vinon, ne uzante alian glason aŭ ian ujon.

Jen la eksperimento :



Oni metas sur la glason kun akvo maldikan folion el papero, kiu ĉiuloke tuŝas la akvon; oni returnas la glason kaj, pro la premo de l'aero oni povas sentime meti ĝin sur la glason kun vino. Tenante singarde la du glasojn metitajn unu sur la alian, oni fortiras lerte malgrandan parton de l' papero kaj tuj formiĝas defluileto, per kiu la vino, pli malpeza ol la akvo supreniras, dum la akvo, pli peza, iras en la malsuperan glason.

Nia bildo klare montras, kiel la eksperimento okazas.



Du novaj steloj ekbrilis en la esperantista ĉielo: «La Stelo de l' Oriento», organo de la «Esperanto Society of India», kaj «Filipina Esperantisto», organo of «The Philippines Esperanto association». Al ambaŭ, niajn korajn dezirojn, Sro Charles S. Banks, la fondinto de P. E. A. nin sendis plej kontentigajn sciigojn: en Manila ekzistas jam 5 kl. inter kiuj scienca esperantista grupo. El Meksikujo ni ricevis ankaŭ ĝojigajn novaĵojn de D^{ro} A. Vargas: scienca societo «Antonio Alzate» enhavas Esperantan parton en sia bulteno; ankaŭ la «Societo Michoacana» en Morelia. La brazila kongreso donas jam fruktojn. En S. Paŭlo, sidejo de 2^a kongreso, fondiĝis du grupoj: Espero katolika, la 21^{an} de Julio, kaj Matena Stelo

(virina), la 11^{an} de Aŭg. (El let. de Sro H. Amaral).

En «The Library and Business man», eldonita por kongreso de la amerika gazetaro sin trovis aludo al Esperanto.

La amantojn de kuriozaĵoj ni atentigas pri la n^o 5^a de «Japana Esperantisto». Tiu n^o enhavas ankaŭ la tutan historion de la esperantiĝo de Japanujo.

† Ni ĵus eksciis kun granda bedaŭro, de nia amiko kaj bonega kunlaboranto J. Lundgren, la morton de la fama sveda inĝeniero Eksmajoro Claes Adelsköld, en la aĝo de 83 jaroj.

Ni salutas profunde la memoron de nia eminenta samideano, kies talento muzika estas aludita en alia parto de tiu n^o.



El « Le Chic Parisien. »
(Granda Albumo de Ĉapeloj).
37, Avenue de l'Opera, Paris.

grandan sukceson havas la kokardoj el metala rubando, kiujn oni precipe metas sur la novan ĉapelon nomatan « Girondin ». (1) Ĉar la helaj floroj ne harmoniigas kun la aŭtuna suno iliaj koloroj fariĝas pli kaj pli malhelaj. Ili estas talpo- lutro- melongenkoloraj, k. a. La plej ŝatataj estas la centfoliaj rozoj, la grandegaj peonioj, la orkideoj, la konvolvuloj el nuancitaj veluroj. Tiuj ĉi lastaj lutrokoloraj sur blanka ĉapelo estas tre belvidaj por junulinoj.

Krom la longaj strŭtoplumoj ĉiam tre luksaj oni uzas ankoraŭ la mallongajn nomatajn « malgrandaj kapoj », kiuj ĉirkaŭas la ĉapelon kiel krono. Tre modaj la tufardeoj.

Ni ne devas forgesi citi la elegantajn ĉapelojn el gluita veluro aŭ « panne » (kvazaŭ pluŝo).

Kiel matenajn ĉapelojn oni multe alprenas la molajn feltojn samformajn kiel la ĉapeloj « Panama » garnitajn per flugiloj de mevoj aŭ per la plumoj nomataj « tranĉiloj ».

Beletaj akcesoraĵoj estas la ĉapelpingloj — pli kaj pli dikaj — bukoj kaj aliaj ornamaĵetoj japanstilaj.

Post nelonge venos la malvarma sezono, kiu kun si alkondukos la neeviteblajn malagrablajn nazkatarojn. Dum tiu malsaneto, kelkaj virinoj kutimas kovreti sian kapon. Tial, konjektante, ke mi igos plezuron al ili, mi tuj klarigos tre facilan faradon de koketa hejma kapornamo. Oni prenas ŝtofan kvadraton laŭ la amplekso de naztuketo el batisto, aŭ eĉ beletan naztukon; ĉe la kvar anguloj oni faras 2-3 faldojn je 10-12 centimetroj de la ekstrema pinto. Oni faldas ankoraŭ aŭ sulkigas la interspacon inter la anguloj por ondumigi la randaĵon. Ĉe du el la anguloj oni kudras du tufojn el rubando, kiujn oni kunligas per rubanda tordaĵo, kaj tio ĉi estas la antaŭa parto de l' kufo.

Nia unua modelo estas el blanka felto, sub kies randaĵo estas streĉita kaŝtankolora veluro. Belegaj tufoj el velurokaŝtankolora kaj ruĝa-bordeau kaj rava tufardeo ĝin ornamas.

La dua estas griza velura kloŝo borderita per tafto malpale blua kaj garnita per konvolvuloj bluj kaj melongenkoloraj.

ROKSANO.
Hon. Mem. de la E. Vagabonda Klubo.



El « La modiste Parisienne »
3, Rue du Quatre Septembre, Paris.

Pro la teruraj superakvegoj kiuj, nuligante fabrikejojn, firmojn, vinber-ejojn, k. c., k. c., ĵus ruinigis mian departementon, mi estis tute preme-gata de nigra papilario, kiam mi ricevis leteron de nia aminda ĉefredak-toro dirantan: « Roksano, mi deziras Modan Kronikon por la oktobra numero. » Tuj, kvazaŭ tuŝita per vergo de bonfaranta feino, mia kor-premanta papilario fariĝis blua, rozkolora, sekve plene ĝojiga. Tiel multe mi ŝatas nian Esperanton, nian Tra la Mondo'n kaj bablidadon kun miaj ĉiutlandaj karaj samideaninoj, ke miaj malgajaj pensoj forflugis, kaj ridet-ante mi prenis mian plumingon.

Pri kio mi tuj parolos? Pri ĉapeloj, se vi volos.

« Ĉu la grandegaj triumfos ankoraŭ dum la tuta sezono? » Tia estas, mi vetas, la demando, kiun miaj legantinoj prezentos al mi. Nu! ĝoju, vi, grandaj virinoj, kiuj ŝatas ilin, kaj vi, malgrandaj virinoj, kiuj ilin malŝatas. Nia reĝa Moŝto, La Modo, ne estas tiraniema: ŝi volas feliĉaj ĉiujn regatinojn siajn; tial, ĉiu sentime povas elekti, kion plej ĉarme ornamas sian kapon, ĉar kvankam la grandega ĉapelo-kloŝo estas atinginta la supregon de sia sukceso, oni vidas ankoraŭ ravajn malgrandajn ĉapelojn tre, tre modajn. Kaj... sed ĉu mi devas komuniki al vi la jenan sciigon, kiu ne estas absolute certa, ĉar la Modo estas pli kapricema ol beleta... eĉ malbeleta virino? Ĉu tia komparo estas ĝusta, amikinoj? Mi ne scias, sed mi scias, ke kapricema estas la kompatinda sekso laŭ la opinio de l' viroj, kaj laŭ la diro de nia lertega samideano. S^{ro} Camille Aymonier, kiu tiaj nin montras per sia vere ĉarma « Kanto de l' Diabolo », Ho! Ĉu estas permesite tiel deflankigi de sia temo? Mi rapidu reveni al miaj ĉapeloj, kaj diri ke, laŭ certigo de kelkaj ĉapelkreistoj, ĉe la fino de l' baldaŭna vintro la malgrandaj plene venkos. Ŝajnas al mi kvazaŭ mi vidus la nuban mienon de la haristoj. Kiel dankaj al ni ili estus, se ni sendus petskribon al nia reĝino por ke ŝi eterne daŭrigu la nunan modon, kiu necesigas buklojn sur bukloj por doni al nia kapo la proporciajn postul-atajn de la grandegaj formoj. Amuze estas nun vidi la ĉapelistinojn, kiam ili faras provon de siaj modeloj sur siaj klientinoj: ili preskaŭ bezonas talenton de kombistino: tien, ĉi tien, ĉien ili devas ja meti buk-etojn por plenigi ĉiujn malplenaĵojn. Tial la « barrette » (suba parto de la ĉapelo, kiu ĝin klinas laŭplaĉe) estas rapide garnita per iom da tulo, ĉar ĝin kaŝos la falsaj haroj.

La nunan sezonon sub la randaĵo de l' feltaj ĉapeloj kaj ankoraŭ de l' veluraj — pleje el dukolora veluro similanta al « veluro-spegulo » t. e. veluro kun argentecca rebrilo — oni streĉas tafton aŭ atlanon ne samko-loran kiel la felto aŭ la veluro; kaj, kiel garniturojn, oni ofte vidas ankoraŭ dikegajn tufojn el rubandoj aŭ veluroj diversnuancaj. Ekzemple sur tabak-kolora ĉapelo estas tufoj verdaj, bronzkoloraj, malpale violkoloraj.


(1) Ĉapelo portita dum la Franca Revolucio.

L'ESPERO.


Poezio de D^o L. L. Zamenhof.

Muziko de A.-J. Witteryck.

Marsilmo.




1. En la mond - on ven - is nov - a sent - o, Tra la mond - o ir - as fort - a vok - o ;
 2. Sub la sankt - a sign - o de l' es - per - o Ko - lekt - iĝ - as pac - aj ba - tal - ant - oj
 3. Sur neŭ - tral - a lingv - a fun - da - ment - o, Kom - pren - ant - e un - u la a - li - an,



Perflug - il - oj de fa - cil - a vent - o Nun de lok - o flug - u ĝi al lok - o !
 Kaj rapid - e kresk - as la a - fer - o Per la - bor - o de la Es - per - ant - oj.
 La pol - o - j far - os en kon - sent - o Un - u grand - an rond - on fa - mi - li - an.



Ne al glav - o sang - on so - if - ant - a Ĝi la hom - an tir - as fa - mi - li - on :
 For - te star - as mur - oj de mil - jar - oj In - ter la pol - o - j di - vid - it - aj :
 Ni - a di - li - gent - a ko - leg - ar - o En la - bor - o pac - a ne lac - iĝ - os,



Al la mond' e - ter - ne mi - lit - ant - a Ĝi pro - mes - as sankt - an har - mo - ni - on.
 Sed dis - salt - os la ob - stin - aj bar - oj Per la sankt - a am - o dis - bat - it - aj.
 Ĝis la bel - a song - o de l' ho - mar - o Por e - tern - a ben' e - fek - tiv - iĝ - os.



mi iajn konsilojn. Interalie li plendis, tial ke la lokaj gazetoj ne sufiĉe subtenas la aferon esperantistan. « Sendu — mi respondis — eĥojn, mallongajn precizajn sciigojn, kies enhavo devige atentigos la gazetojn mem, kaj kiujn, sekve, oni enpresos. — Sed ĉiuj ne volas enpresi. Tiel, mi sendis artikolojn pri la kongreso al ĉiuj ĉi-tiaj gazetoj. Du enpresis, unu enpresis eltranĉinte iajn partojn, la kvara ne volis enpresi eĉ unu solan linion. Tamen, propramove, ĝi estis doninta, kelke da tempo antaŭe, kopion de gazetaj sciigoj. — Ja, tio tute pravigas tion, kion mi diris al vi: ne enpreson de literaturaĵoj oni devas peti al la gazetaro, sed nur de sciigoj kapablaj impresi la legantaron, elĉerpitaj el la organoj, kies tasko estas liveri tiajn sciigojn. »

Kaj, montrante al li la ĵus ricevitajn duoblan numeron de « Tra la Mondo », mi povis diri al li: « Ĉu vi opinias, ke oni ne enpresos eĥojn pri la Jubileo, aŭ la turista informejo de Nova Zelando, aŭ la malfermo de la Brazila Kongreso de la ministro mem de la Internaj aferoj, se vi ilin sendus! Mia sperto de propagandisto konvinkis min pri la malo. »

Nun, kiam komenciĝas nova agada jaro, estas necese, ke ĉiuj penadu helpi la ĝeneralan antaŭen marŝadon. Oni ne forgesu ke:

« Eĉ guto malgranda konstante frapanta
Traboras la monton granitan. »

Ni ĉiuj alportu nian malgrandan guton. Rilate al la naci-lingva gazetaro, ĝi konsistas el sciigoj, modestaj sed ripetitaj. Eble oni ne enpresos ĉiujn, sed certe kelkajn; kaj tiel la legantaro, vole nevole, precipe se la eĥoj estas lerte verkita, iom post iom esperantistiĝos, nekonsciante pri tio.

Jam sufiĉe da niaj legantoj tiel agas, per niaj sciigoj, kaj ne pentas por tio; ĵus, ekzemple, skribas al mi S^{ro} Haraldo Amaral (Brazilujo): « Mi deziras propagandi vian bonegan revuon: ĉiuj, kiuj helpas « Tra la Mondo », helpas nian gravan aferon. Bonvolu al mi sendi specimenojn, por dissendi al miaj gekonatuloj. »

Ne sole « Tra la Mondo » plaĉas, sed ankaŭ ĝia prenio. Jen, ekzemple, unu atesto, inter multaj aliaj, de S^{ro} Carl Winberg (Svedujo): « Mi multe vin dankas pro la bonega poŝhorloĝo « L'Espero », kiu estas tiel preciza kaj regula, kiel estas Esperanto mem. Bonvolu sendigi al mi novan poŝhorloĝon. Mi baldaŭ havigos novajn mendojn. » STELETO.

Leterfako.

Mi ricevis de S^{ro} Gaston Moch la jenan leteron.

ESTIMATA SINJORO,

« De tempo al tempo dormetas Homero la bona », diris la poeto. Versajne, do, vi dormetis momenton dum la malferma kunsido de la Tria Kongreso, kaj en sonĝo vi aŭdis min diri, ke mi havas la « ledan devon » legi la ricevitajn leterojn kaj telegramojn. Mi ne parolis pri ledi, nek pri io simila; kontraŭe, kun ĝojo mi konstatis, ke tiuj atestoj de frateco estas tiel multaj, ke oni ne povas ilin legi ĉiujn.

Ne nur malprava estas via riproĉo, sed eĉ tute ne versimila. Ĉu vere vi povas kredi min tiel malsaĝa, ke, se mia kongresa lasko ŝajnas al mi ledi, mi plendus pri ĝi ĉe la Kongreso? Mi simple forlasus ĝin al iu alia. Tute ĝenerale, la sola devo, kiu

povas ledi min, estas tiu, min defendi kontraŭ nemerilitaj atakoj.

Cetere, mi ne prenis sur min, elekli inter la depeŝoj: la leciono pri « dececo », kiun vi tiel afable donis al mi, trafas la Kongresan estraron, kiu agis same, kiel la estraroj de ĉiuj grandaj kongresoj. Ŝajnas, ke, pri tio, la sperto mankas al vi, kvankam vi devas esti rimarkinta, ke oni faris jam same, la pasintan jaron, en Genevo. Ju pli kongreso sukcesas, des pli da telegramoj kaj leteroj ĝi ricevas, kaj des pli neeble estas, ilin konatigi ĉiujn. Esperinde estas, ke momento venos, kiam ili estos tiel multaj, ke oni kontentigos montrante ilian amason kaj legante nenium el ili!

Pri viaj personaj ideoj, rilate al la maniero igi niajn kongresojn pli interesaj, mi havas nenion por diri: tio koncernas la Kongresan Komitaton, kiu, se vi sendos al ĝi proponojn, esploros ilin atente. Al mi sufiĉis restarigi la realecon de la faktoj, pri la vortoj, kiujn vi erare alkalkulis al mi.

Kun estima saluto,

GASTON MOCH.

Estas aĵoj, kiujn oni ne imagas, kaj pri kiuj oni parolas, nur kiam pri ili oni estas certa.

Tiu certeco devenis de dormeto! Des pli bone; kaj kun kia ĝojo, sed kia surprizo, mi ĝin eksciis kaj eliras el la malbona sonĝo, kiu — ĉar precize mi opiniis tute same kiel S^{ro} Gaston Moch — donis al mi la kuraĝon lin kritiki.

Sed mi tute ne interkonsentas kun li, kiam li penas kredigi, ke kritiko — kiu celis unu personon, kaj nur unu — atingis aliajn; la Kongresan estraron. Por kiu ne dormetas — kaj la dormeto estas ne akceptebla, kiam oni povas elekli la momenton por legi, eĉ relegi, tekston — estas videble, ke la kritiko koncernis nur la vorton, kiun mi aŭdis sonĝe. Sufiĉas relegi la frazon, kiun finas la vorto « kiu havis la honoran devon raporti pri ili », por esti pri tio konvinkita: ne estas parolite pri plena konigo de ĉiuj ricevitaj dokumentoj. Eble la sperto mankas al al mi, kvankam mi ne estas tute sensperta pri « grandaj kongresoj »; sed certe mi ne estas tiel malsaĝa, por postuli neeble aĵojn.

Pri S^{ro} G. Moch, mi dirus volonte, ke li estas tro sperta; ĉar, ĉeestinte multajn *ordinarajn* internaciajn kongresojn, li estas kvazaŭ blazita (1) pri la intereso de la unua kunsido kaj, laŭ ĝia diro mem, ŝajnas ke li konsideras la malferman kunsidon de Esperanta kongreso, kiel tiun de ia ajn granda kongreso.

Kia eraro tio estus, laŭ mi: en ordinara internacia kongreso, la saluto de la diversnaciaj delegitoj estas agoj el internacia ĝentileco. Funde, kore, ili havas neŭan signifon, kaj la laŭdoj disverŝitaj iun jaron sur ia lando, ia urbo, ejoj de la kongreso, estos disverŝitaj tute same, kaj devige, sur alia lando, alia urbo, dum la sekvanta kongreso.

Tiuj salutoj estas do antaŭmanĝoj, ofte nekomprenitaj de la plimulto el la ĉeestantoj pro la lingva diverseco; kaj sekve, estas tute nature eĉ laŭdinde, ke oni penu malplilongigi ilin, rapidante al la seriozaj laboroj.

Estas tute malsame rilate niajn solenajn kunsidojn, dum kiuj ni estas kvazaŭ transportitaj, sinsekve, kun ĉiu parolanto, en ĉiujn partojn de nia senlima « Esperantujo ».

Tiun belan jaran sonĝon oni ne mallongigu!

(1) Fr. blasé, germ. blasirt.

A. MONTROSIER.



Premio al niaj gelegantoj.

Por esti agrablaj por niaj legantoj kaj samideanoj, ni klopodadis kaj faris interkonsenton ebligantan liverigi, *hejmen* kaj sen transportkosto en ĉiun Eŭropan landon krom Rusujo (Transmare kaj Rusuje, eksteren transporto kaj limdepago plue), je la malgranda prezo montrata ĉi sube, la precizegan poŝhorloĝon L'ESPERO, kiu eliras el unu el la plej bonaj svisaj fabrikejoj, kaj kies ujo, el blanka metalo oksidita kvazaŭ malnova arĝento, estas fotografe montrata ĉi apude (ĝustagrande por sinjoroj).

La poŝhorloĝo estas plene **garantiata**, bonege reguligita, radaro je anko perfektigita, eleganta formo. La sendo estas farata kontraŭ poŝta repago aŭ antaŭa pago, laŭ peto sendita al la administracio de « Tra la Mondo ».

Por SINJOROJ: Unika kvalito, supera, 30 fr. = 12 Sm. — Por SINJORINOJ, kun verdemajlita stelo: Ora, 90 fr. = 36 Sm.; arĝenta, 45 fr. = 18 Sm.

GLICERINA DENTPASTO



Kiu ĝin uzis, tiu ĝin uzos.

GELLE FRÈRES

Parfumistoj **PARIS**

La firmo korespondas Esperante.

Al samideanoj en la tuta mondo.

GRAVA AVIZO.

NI povas havigi al niaj klientoj kaj korespondantoj ĉiujn librojn esperantajn kaj ĉiujn librojn **NE** esperantajn. NI akceptas abonojn por ĉiuj gazetoj en la mondo. NI aĉetas malnovajn librojn kaj gazetojn en Esperanto. NI sendas niajn katalogojn senpage.

Librairie de l'Esperanto
(Internacia esperantista librejo)
15, Rue Montmartre
Paris.

Nova adreso ➡

Internacia Scienca Revuo

Oficiala Monata Organo de la

Internacia Scienca Asocio Esperantista

Administracio kaj Redakcio:

SCIENCA OFICEJO, 8, RUE BOVY-LYSBERG,
Ĝenevo-Svislando.

Specimeno senpage laŭ peto.

Jara abono: 2,75 Sm. (2 spesmiloj 75 spesdekoj).
Unu numero: 25 spesdekoj

Oni abonas ĉe la *Scienca Oficejo*, 8, rue Bovy-Lysberg, Ĝenevo (Svisujo) aŭ ĉe *Möller & Borel*, Berlino (Germanujo), *G. Warnier & Cie* Parizo (Francujo), « *Brita Esperantista Asocio* » Londono (Anglujo), *Raffaello Giusti*, Livorno (Italujo), *M. Arct*, Warszawa (Polujo), *J. Espasa*, Barcelona (Hispanujo), *A. F. Höst & Søn*, Kjöbenhavn (Danujo).

Librairie de l'Esperanto

15, rue Montmartre, Paris

VIDI ĈI SUPREN.



LIKVORO DE L'INTERLIGO
(FORTIGA KAJ DIGESTIGA)

La analizo pravas la bonajn kvalitojn de tiu-ĉi higiena likvoro
Ĝi meritas do la konfidon kaj la preferon de la Popoloj

TROYES-FRANCE L. GUYOU & J. FÈVRE



CHABLIS QUINA

EL MALNOVA ENLANDA VINO.

Kiel ĉiuj preparoj kun kinkono, la **CHABLIS QUINA**, deponas maljunigante,
sed tamen ĝi konservas la siajn eminentajn higienajn proprecojn.

LIVERITA LAŬ LA LEĜO. **L. GUYOU & J. FÈVRE**
TIU VINO NE ESTAS MEDIKAMENTO TROYES

LA INTERNACIA TRINKAĴO!

Viskio Esperanto

Registered trade mark Marque déposée
N° 270,042. N. 13,195
Registered Label No 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la
nomon **ESPERANTO** sur la afiŝeto, kiu estas
desegnita kiel propagandilo.

Buchanan, Scott & Co

GARTHLAND STREET,
GLASGOW (Skotlando).

Telegrafa adreso: Esperanto - Glasgow.

MILKA VELMA NOISETTINE Suchard

LA BONGUSTEGAJ
ĈOKOLADOJ
POR MANMANGI.



ESPERANTINE

Digestiga likvoro

Alprenita je la Esperantista
Kongreso. Ĝenevo 1906

Prezo: FRANCUJE. —
11 f50 la kesto da 2 boteloj
Sen kosto pri transporto kaj
impotoj.

ALILANDE. — 4 f ĉiu botelo
prenita en St Etienne,
impotoj kaj transporto pluaj.

Ĝenerala Tenejo por
Francujo kaj Fremdujo:
J. B. Brunon-Chauvet
St Etienne (France).

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.


Ĉiuj korespondantoj, mendoj, k. a. devas esti senditaj nur al nia administracio por eviti erarojn aŭ prokrastojn. Oni ankaŭ abonnu aŭ reabonu senpere pro la sama motivo.

Adreso: **Gazeto « Tra la Mondo », Meudon (S. et O), France.**

Urĝaj sciigoj: **REKLAMOJ, ANONCOJ, k. a. devas alveni antaŭ la 10^a de ĉiu monato, por la tuj elironta N^o.**

ASP KANDELLANTERNOJ

por Biciklistoj



Malgranda, Malpeza,
Oportuna, Pura,
Neestingebla
en Ventego.
Funkciadas bonege
nur kiam oni uzas
la por ĝi

Konstruitajn ASP-Kandelojn

145.000 Lanternoj jam venditaj!

Kostas: 4 danajn kronojn, = Spes. 2,20
kun lenso 5 kronojn, = » 2,75

18 Kandeloj kostas 1 1/2 kronojn = » 0,83

SENDOTA ĈIEN DE


**O. F. ASP, Kopenhague.
DANUJO.**

ANGLUJO

Propraj Kondiĉoj.

Generala Agento:

S^{ro} G. RUTTER, 30, Red
Lion Squar, LONDON.



L'Internacia Signo

estas la « VERDA STELO » Gasse

MARKO REGISTRITA

fr. 1 por unu; fr. 9 por 12; fr. 45 por 100 (per
kunmona mendo). Ĉe S^{ro} Emilo Gasse, 105
rue du Lycée, Le Havre (France).

PETU

LA

ORA MARKO.

SENPAGAN TARIFON

POR ESPERANTO ★ POR ESPERANTISTOJ

Vera

Vino Campanja

Originala Produktejo de
FORTIN PÈRE & FILS en ESPERNAY (France).

Respondoj.

J. Rossell' (Mallorca). — Sinceran dankon, sed ni ne enpresas versojn.

Por la blinduloj. — Vendo de tre ĉarmaj 4-foliaj trifolioj gluitaj sur kartetojn de *Fino Allin.* (Aliaj estis donataj al F^{ino} Z. d'Her en Kembriĝo).
3 fr.

S^{ro} P. P. Fewings (Australia). — Certe represoj de malnovaj verkoj elvenditaj estas dezirinda. Tio koncernas la eldonajn firmojn.

S^{roj} de Bann, Ruŝkin, Stevens, turnu vin senpere al la firmo *Fortin Patro kaj Filo.*

S^{roj} R. Rajezy, Romein kaj Wynandts, Southcombe, Fize. — Koran dankon por viaj sendaĵoj.



REABONO.

Niaj legantoj, kies abono finiĝis, ou finiĝas ĵarĉine bonvolu TUJ reaboni.

Ni respondas TIE ĈI al la leteroj akompanataj de internacia responda kupono; PRIVATE al la leteroj akomp. de du internaciaj kuponoj.

Rekomendataj firmoj.

ESPERANTA

80, Rue Mazarine, PARIS 6^e.

RESTORACIO

Bona familia kuirado je moderaj prezoj. La mastro parolas kaj instruas Esperanton

ANONCAGENTO.

C. A. G. BROWNE, 53 kaj 54, Wych Street, Strand, W. C. London, Anglujo, deziras korespondi pri anoncoj kaj reklamoj. Varbas anoncojn por « Tra la Mondo »

TARIFO DE NIA PUBLIKIGADO.

Prezo je la linio	}	ANONCOJ:	Por unu anonco:	0 fr. 75 ĉiulinie.		
		(33 literoj)	Por 3 anoncoj almenaŭ	0 fr. 60 —		
		REKLAMOJ (50 literoj)	Por la tuta jaro	0 fr. 50 —		
			(50 literoj) :	2 fr. 50 ĉiulinie.		
		Prezo je la paĝo (1 paĝo = 432 cm. kv.)				
		1 paĝo	1/2	1/4	1/8	1/16
Por unu anonco:		100 fr.	58 fr.	32 fr.	18 fr.	10 fr.
Por 3 anoncoj almenaŭ:		80 fr.	46 fr.	26 fr.	15 fr.	8 fr.
Por la tuta jaro:		50 fr.	30 fr.	16 fr.	9 fr.	5 fr.

Sendi la tekstojn kun la menda kosto al « Tra la Mondo », Meudon (S. & O.) France, antaŭ la 10^a de ĉiu monato por la numero eliranta je la fino del' monato.

NE KOMERCAJ ANONCETOJ.

1,25 fr. por 4 linioj enhavantaj ĉiu 33 literojn minimume. Ĉiu plua linio komencita kostas 0 fr. 25.

Pro la dislegado de « TRA LA MONDO » EN LA TUTA MONDO, tiuj anoncoj malkaraj estas tre rekomendataj al la multaj filatelistoj kaj poŝtkartaj kolektistoj; pli ĝenerale al ĉiuj kolektistoj kaj al ĉiuj dezirantaj uzi Esperanton por havigi rilatulojn en fremdaj landoj, aŭ por dokumentiĝi; ni rekomendas ankaŭ tiujn anoncojn al la grupestroj dezirantaj interrilatiĝi kun fremdaj samideanaj grupoj, kaj al la Esperantaj profesoroj, kies studentoj deziras trovi fremdajn korespondantojn por perfektiĝi en la lingvo per la internacia interkorespondado.

FERVOJOJ DE PARIS-LYON-MEDITERRANÉE.

VINTRO 1907-1908.

Rilatoj rapidaj inter Paris kaj Italujo.

Per Simpiono: per la luksa vagonaro « Simplon-Ekspres » (L-V, R-V), deiro de Paris P. L. M., lunde, merkrede, sabate, je 8 h. 05 vesp., de 1^a de nov. ĝis la 29^a de feb.; — kaj ĉiutage post la 1^a de marto. Paris-Milano en 15 h. London-Milano en 24 h. 30.

Per Monto-Cenis: per la luksa vagonaro « Paris-Romo » (L-V, R-V), deiro de Paris P. L. M., marde, ĵaŭde, sabate (3 dec.-19 majo): 11 h. 20 mat.; deiro de Komó, lunde, merkrede, sabate (7 dec.-23 majo): 1 h. 40 vesp. (H. E. C.). — *Nombro da lokoj limigitaj.*

Rilatoj rapidaj inter Paris kaj la Lazura Marbordo.

Tage: per la « Côte d'Azur-Rapide » (vagonaroj 15 kaj 16) (1^a kl.; S-L; S-V; R-V) — Paris-Nice en 13 h. 50.

Nokte: a) per la vagonaroj « rapidegaj » 17 k. 18 (1^a kl.; L-V; S-L; k. Salonoj kun 2 litoj kompletaj) Paris-Nice en 24 h.

b) per la luksa vagonaro (L. 21-L. 22) « Calais-Méditerranée » L-V; R.) Paris-Nice en 15 h. — London-Nice en 24 h.

c) per la rapidaj vagonaroj 7 kaj 10 (1^a kl. L-V; S-L.) Paris-Nice en 17 h. — London-Nice en 27 h.

Nombro de lokoj limigitaj. — Por pliaj sciigoj esploru la specialajn aŭsojn.